1986 junio
79a jaro
n-ro 966 (6)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Estrara raporto pri 1985

Vi trovos,

ke la tutan spacon de ĉi tiu numero voris la Estrara Raporto pri la agado de UEA dum 1985. Ĉar vi ĉiuj, nun unu jaron antaŭ la Centjara Jubileo, subite transformiĝis el pasivaj konsumantoj de la Internacia Lingvo en fervorajn aktivulojn por ĝia disvastigo tra la mondo, vi ne povus atendi pli interesan revunumeron ol estas tiu ĉi. El ĝi vi informiĝos pri la agado por Esperanto ĉie tra la mondo, kaj tio sendube helpos al vi trovi vian propran lokon en tiu grandega armeo da laborantoj por la Zamenhofa lingvo.

Ĉi-apude, sur la najbara paĝo, vi rimarkos, ke unu el la plej eminentaj adeptoj de la Internacia Lingvo, d-ro W. Drees, jam sukcesis havi sian propran Centjaran Jubileon. Mirinde kaj admirinde!

Kialo pro kiu vi ricevas ĉi tiun numeron kun malfruego, ekstra kialo, estas la nekredeblaj evoluoj pri la Kongreso en Pekino. Ni en la CO simple dronas sub lavango da novaj aliĝoj. Nun ŝajnas, ke la 71a UK en Pekino superos la pasintjaran Kongreson kaj eventuale havos pli ol 2 300 aliĝintojn (inter kiuj tamen nur ĉ. 300 ĉinoj).

Enhavo

101 **Jubileoj:** Willem Drees: 100-jarulo kaj 50-jara esperantisto (A. de Jong)
102 KSM: Perkomputila servo al korespondantoj (R. Llorens); **Internacia Jaro de Paco:** Imitinda kunlaboro belga-bulgara (Ĥristo Manolov)
103 **Raporto de la Estraro pri la agado de UEA dum 1985:** Enkonduko; Ĝeneralaĵoj; Administrado
105 Financo; Institucio Hodler '68
106 Periodaĵoj kaj serioj; Kongresoj
107 Jubilea Jaro; Informado
108 Eksteraj rilatoj
110 Kulturo kaj edukado
111 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
113 Landa kaj regiona agado
114 Faka agado
115 Esploro kaj dokumentado
116 Finaj vortoj; Revizora raporto; Revizora deklaro
117 **Financaj aldonaĵoj al la Raporto**

La kovrilo

Sur nia kovrilo (kaj aliloke dise tra la numero) denove kelkaj fotoj pri la rekonstruita Domo de UEA en Roterdamo. Vi ja rekonas la fieran prezidanton de la Asocio (supre maldekstre), kiu pozas antaŭ la ĉefpordo de "sia" nova domo. Verdire, la persisto de Maertens gravege rolis pri la efektivigo de la rekonstruaj laboroj. La alia supra foto montras vidaĵon el la nova Libroservo, la ĉefa fieraĵo, ĉar ĝi aspektas treege moderne kaj komforte. Sur la suba kovrila foto interparolas (de maldekstre) s-ro Maertens, Osmo Buller, la nova direktoro de la CO, kaj M.H. Vermaas, iama direktorino de la CO.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39; **Telekso:** 23721 UEA NL; **Telegramadreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.
Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.**
Voĉlegata por blinduloj.
Redaktoro: Geoffrey Sutton.
Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.
Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.
Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio; ☎ (03) 770 64 86.
Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.
Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.
Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 42 37 14 73.
Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.
Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.
Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 966 (6), juni 1986. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

95/1343/D

Willem Drees: 100-jarulo kaj 50-jara esperantisto

La 5an de julio d-ro Willem Drees, estinta ministro pri sociaj aferoj (1945-1948) kaj ĉefministro (1948-1958), nun honor-ministro de Nederlando, festis la centan datrevenon de sia naskiĝo. En 1954 li estis la Alta Protektanto de la 39a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem kaj dek jarojn poste membro de la Honora Kongresa Komitato de la 49a UK en Hago (1964). Ankaŭ ĉi-jare, la 1an de majo, li festis sian 50-jaran membrecon en Asocio de Laboristaj Esperantistoj (FLE). D-ro Willem Drees estas membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Willem Drees estis fama ministro kaj same fama propagandisto por la Internacia Lingvo. En 1954, dum la 39a Universala Kongreso en la nederlanda urbo Haarlem, Willem Drees, tiam la ĉefministro de Nederlando, akceptis esti la Alta Protektanto de tiu kongreso. Sed ne nur tiun honoran postenon li okupis. Lia intereso pri ĉiuj internaciaj kontaktoj kaj la konstato, ke al ili mankas vere neŭtrala interkompreniilo, igis lin esprimi sian opinion pri la bezono de Esperanto.

En 1957, kiam li ankoraŭ estis ĉefministro, li partoprenis la 30an Kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Roterdamo. La internacia agado de la laboristaj organizoj daŭre havis lian atenton. En 1965 li subskribis la peticion de UEA al Unui-

ANP-Foto

La foto montras la nederlandajn ĉefministron, Ruud Lubbers, kaj antaŭan reĝinon, princinon Juliana, kiu en marto inaŭguris buston de Willem Drees en la Ministerio pri Ĝenerala Administrado en Hago. La buston skuptis Sybilla Krosch. La 1an de julio la nederlanda poŝto aperigis poŝtmarkon honore al la 100-jariĝo de doktoro Drees.

ĝintaj Nacioj pri efika helpo al disvastigo de Esperanto kaj per tiu ago donis plian fortan akcenton al la agado.

Se konvena okazo sin prezentis, li uzis ĝin por pledi por la enkonduko de Esperanto. Li menciis la Internacian Lingvon en la verko *Het Nederlandse Parlement, toen en nu* (La nederlanda parlamento, antaŭe kaj nun), skribante i.a.: "Libera kaj facila mensa komunikado inter la loĝantoj de ĉiuj landoj estas plej urĝe necesa. Antaŭ ol ni atingos tiun staton, ni devos forigi la lingvajn malfacilojn inter la popoloj. Speciale la laborista movado, kiu ja tiel forte havas internacian karakteron, havu la taskon studi la problemon kiel plej bone solvi ĝin. Laŭ mia konvinko, la solvo troviĝas en la genie kunmetita mondhelplingvo Esperanto, kiu estas kreita por tiu celo. La lingvo estas logike, sisteme kaj simple konstruita kaj plenplene jam pruvis sian taŭgecon por esprimi ĉiajn pensojn kaj sentojn. Jen ĉiuj tiaj ecoj, pri kiuj kelkaj homoj dubas, ĉu ili apartenas al kreita lingvo."

En *Herinneringen en opvattingen* (Memoroj kaj opinioj, 1983), esence aŭtobiografio, li dediĉis tutan ĉapitron al "Esperanto".

Plej bone ni honoras d-ron Drees per cito de parto el la festparolado, kiun li faris okaze de la 50a jubileo de FLE en 1961. Kvankam jam pasis 25 jaroj, la enhavo ankoraŭ estas valida:

"Unesko ja principe deklaris sin favora al Esperanto, sed realigi tion per aŭtoritatoj, mem neniel ŝatantaj la ideon, ne estas facila afero; tamen valoras la penon daŭrigi la batalon por tio kaj en la daŭro ĝi konturiĝos kiel io necesa. La mondo pli kaj pli unuiĝas kelkrilate; la kontraŭaĵoj pliakriĝis, sed pro la trafiko kaj la tekniko en la tuta mondo oni nuntempe interkontaktas. Oni devas, eĉ se provizore nur laŭvorte, lerni kompreni unu la alian, por ke en la daŭro oni sin komprenu ankaŭ en alia, pli spirita maniero. Trudiĝas la penso, ke ekzistas kunligiteco en la mondo kaj ke do devas esti, flanke de la naciaj lingvoj, monda lingvo. Mi estas konvinkita, ke la vojo al tiu celo konsistas en Esperanto...". (Tradukita el *Laborista esperantisto*, n-ro 6/1961).

A. de Jong

KSM: Perkomputila servo al korespondantoj

Dank' al sia komputilo, Koresponda Servo Mondskala (KSM) nun kapablas sendi al ĉiu petanto liston de la alskribintoj, kiuj deziras korespondi pri iu specifa temo, ekzemple, kolektantoj de poŝtmarkoj, moneroj, esperantaĵoj aŭ iu alia temo. KSM enlistigas ankaŭ tiujn, kiuj deziras reciprokan gastigadon. Simile, KSM nombras la lernejojn, en kiuj Esperanto estas instruata, kaj tial **alvokas ĉiujn respondeculojn de Esperanto-kursoj en lernejoj** informi al KSM, sendante la adreson de la lernejo, nomon de la instruisto kaj aĝon kaj nombron de la lernantoj. La enskribo sur tiuj listoj estas senpaga. Kiu deziras ricevi iun el la listoj, devas aldoni po du internaciajn respondkuponojn por ĉiu listo aŭ preferinde sendi po sep francajn frankojn al la franca poŝtĝirokonto: R. Llorens, Marseille 7.829.40-L.

KSM disponas pri multaj adresoj de korespondemuloj el orienta Eŭropo, Irano, Afriko,... sed bezonas adresojn el Skandinavio kaj FR Germanio. Skribu al: **Koresponda Servo Mondskala, "Les Hortensias 2", 121 bis Bld. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.**

Jen la unua listo (en francaj frankoj) de la donacintoj al la KSM-kaso por aĉeti komputilan materialon, kiu kompreneble fariĝas propraĵo de UEA: Francio: S-ro F.C. 150,00; s-ro R.D. 50,00; s-ino J.R. 250,00; s-ino C.M. 200,00; s-ro I.Q. 50,00; s-ro J.G. 30,00. Nederlando: S-ro C. J-F. 20,00. Usono: S-ro C.G. 212,77. Sumo ĉi-jara: 962,77 FF. Elkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Pliaj donacoj estas bonvenaj, ĉu en la supre menciitan konton ĉu en la UEA-konton ksmx-i.

R. Llorens

INTERNACIA JARO DE PACO

Imitinda kunlaboro belga-bulgara

Honore al Internacia Jaro de Paco, la distrikta estraro de Bulgara Esperantista Asocio en Veliko Târnovo lanĉis la ideon pri ĝemeliĝo de neesperantistaj porpacaj komitatoj en diversaj landoj pere de Esperanto.

Dum majo en tiu antikva ĉefurbo de Bulgario alvenis s-ro Clément Tholet, ĝenerala sekretario de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM) kaj membro de Monda Porpaca Konsilantaro. Komisiita de la Provinca Komitato por Defendo de la Paco en Lieĝo (Belgio), li faris oficialan viziton al la Distrikta Porpaca Komitato en Veliko Târnovo. Subskribita estis kontrakto por amikeco kaj kunlaboro inter ambaŭ komitatoj. Esperanto peradis dum la preparlaboroj kaj estas agnoskita kiel oficiala lingvo de la interrilatoj. Krome, la kontrakto devigas la komitatojn en la du urboj subteni kaj kunlabori kun la Esperanto-movado en iliaj regionoj. Planite estas interŝanĝi spertojn, informojn, materialojn kaj starigi recìprokajn personajn kontaktojn.

Ĥristo Manolov

Raporto de la Estraro pri la agado de UEA dum 1985

1. ENKONDUKO

Ĉi tiu Estrara Raporto traktas la agadon de UEA dum la kalendara jaro 1985. Kvankam origine la ideo estis, ke la Raporto aperu en la Jarlibro, t.e. en ĝia enkonduka parto, kiu aperos ankaŭ kiel memstara broŝuro, pro kelkaj teknikaj problemoj monŝriĝis necese aperigi la Raporton denove en ĉi tiu revuo. Tio ja havas siajn avantaĝojn por multaj individuaj membroj de la Asocio, ĉar ĉi tiu revunumero iras al ĉiuj individuaj membroj de UEA, do ankaŭ al tiuj, kiuj normale ne ricevas la revuon. Ni restas ankaŭ ĉi-foje pretaj disponigi la Raporton senpage al ĉiu esperantisto, kiu direktos tian peton al la Centra Oficejo de UEA.

La Estrara Raporto estas kolektiva verko (kaj respondeco) de la estraranoj kaj ĝenerala direktoro de la Asocio. Kiel kutime, ĉe la finredakto ni klopodis eviti rektajn ripetojn de pli ampleksaj raportoj pri unuopaj agadoj kaj laboroj de UEA, al kiuj la revuo dediĉis apartan atenton en sia jarkolekto de 1985. Aliflanke, se la oficiala organo de la Asocio daŭre sekvas la laboron de la Asocio kaj konstante raportas pri tio, ne eblas eviti iom da ripetiĝoj. Ni tamen klopodis, ke vi en la sekvaj ĉapitroj trovu kiel eble plej multe da novaj konkludoj kaj resumoj, kiuj helpos al ni ĉiuj reekzameni niajn planojn kaj prioritatojn sojle de la Jubilea Jaro 1987.

2. ĜENERALAĴOJ

1. Statuto kaj Ĝenerala Regularo: Ne okazis ŝanĝoj en 1985.

2. Honora Patrona Komitato: Elektiĝis al la Komitato en 1985 s-ro Harry Harrison, konata usona verkisto de sciencfikcio, loĝanta en Irlando. Per tio altiĝis la nombro de membroj de la Honora Patrona Komitato al 12 el 11 landoj.

3. Honoraj membroj: La Komitato de UEA elektis en 1985 du novajn Honorajn Membrojn: d-rinon Marjorie Boulton (Britio) kaj s-ron I Ĝe-Hjon (Koreio). Ambaŭ estas konataj kiel verkistoj, pedagogoj kaj aktivuloj en la Esperanto-movado. La nombro de Honoraj Membroj reduktiĝis al 27 pro la forpaso de s-roj Starr (Usono) kaj Friis (Danlando) kaj d-roj Sinoda (Japanio) kaj Setälä (Finnlando).

4. Komitato: La Komitato por la nuna elektoperiodo (1983-86) ampleksas 87 komitatanojn (63A, 7B, 17C) kaj 9 observantojn. Inter la C-komitatanoj estas du novaj: s-ro Dai Song-en (Ĉina Popola Respubliko) kaj d-ro Victor Sadler (Nederlando), alelektitaj en 1985. Por la jaro 1985-86 la Komitato elektis s-ron Richard Hirsch (FR Germanio) kiel sian sekretarion.

5. Estraro: La Estraro kunsidis en Roterdamo en januaro kaj aprilo kaj okazigis teknikan kunsidon por kelkaj estraranoj en decembro. Ĝi kunsidis ankaŭ antaŭ kaj dum la UK en Aŭgsburgo.

6. Komisionoj kaj komisiitoj: Plena listo de ĉiuj funkcioj kaj homoj troviĝas en la Jarlibro. La Komitato starigis en Aŭgsburgo novan Komisionon pri Kongresoj kun la celo ĝisfunde studi la nunan strukturon de niaj Universalaj Kongresoj. Restas la samaj Revizoroj kiel antaŭe.

7. Laborplanoj: Laborplano pri la Internacia Jaro de Paco ekrealiĝis en 1985, precipe pere de la Novjorka Oficejo de UEA. La 4a Baza Laborplano restas valida, kaj plenumiĝas la diversaj planoj kunligitaj kun la Jubilea Jaro (1987).

8. Landaj kaj Fakaj Asocioj: La nombro de aliĝintaj landaj asocioj restas 45. Aldoniĝis du novaj kunlaborantaj fakaj asocioj: Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto kaj Filozofia Asocio Tutmonda.

3. ADMINISTRADO

1.Oficistoj: La meza nombro de oficistoj kaj volontuloj, salajrataj de la CO dum 1985, estis 9,2 – do, konsiderinda redukto kompare kun la antaŭa jaro, kiam temis pri 12,2. Tiu redukto okazis en la dua duono de la jaro kaj estis kaŭzita precipe de klopodoj redukti elspezojn.

2. Volontula Servo: Dum septembro denove deĵoris malnova volontulino Eva Formaggio (Italio), kaj en decembro ekdeĵoris Pasquale Zapelli, ankaŭ el Italio. Kiel volontulo de TEJO/KER laboris de junio ĝis septembro Graham Cansdale (Britio).

ĈI TIUN NUMERON DE LA REVUO KUN LA ESTRARA RAPORTO RICEVAS ĈIU INDIVIDUA MEMBRO DE LA ASOCIO

3. Domo: Tra la tuta jaro 1985 daŭris la diversaj rekonstruaj kaj renovigaj laboroj en la roterdama Domo de UEA. Pro la neceso plurfoje transloki tutajn fakojn el rekonstruota ĉambro en provizoran ejon, kaj post la rekonstruo denove transmeti ĉion en definitivan lokon, la laborkondiĉoj de la geoficistoj estis ekstreme malbonaj. Oni ekzemple pensu kiom da streĉo postulis la fakto, ke la Libroservo dum 1985 devis trifoje ŝanĝi sian ejon. Tamen, fine de la jaro, tiu plej granda movada librejo (kun pli ol 2 700 titoloj) akiris vere imponan kaj moderne ekipitan ejon, tiel ke jam nun estas klare, ke la rezulto valoris ĉiujn penojn kaj suferojn spertitajn.

Restis iom da renovigaj detaloj por kompletiĝi dum 1986, kvankam la ĉefaj laboroj (kaj investoj) jam finiĝis. Estas agrable konstati, ke ni nun ricevas ĝeneralan aklamon de ĉiu unuopa vizitanto de la Domo, ĉar oni konstatas, ke la asocia sidejo aspektas digne kaj moderne. Kompreneble, ankaŭ la oficistoj spertas grandegan pliboniĝon de siaj laborkondiĉoj (kvankam ne estas tiel pri la laborkvanto traktenda).

4. Aŭtomatigo: Eble la ĉefa prinotindaĵo rilate la aŭtomatigon dum 1985 estas la fakto, ke la komputila maŝinaro travivis la jaron spite la neadekvatajn fizikajn kondiĉojn en la rekonstruata Domo. Sed, kvankam la komputilo eltenis la polvonubojn kaj brulavangojn tra 1985, la komputilistoj ne eltenis ĝin: Ingvar Schoultz, juna, talenta (kaj eksperimentema) svedo, kiu pasigis tri kaj duonan jarojn en la CO kaj parte okupiĝis ankaŭ pri komputila programado, rezignis pri sia posteno meze de majo 1985; juna kaj ne malpli talenta usonano Derek Roff eltenis nur kelkajn monatojn da provlaboro antaŭ ol demisii. La Oficejo do daŭre restas sen kompetenta komputilisto, kio malhelpas progresigi la ambiciajn planojn sur la kampo de la aŭtomatigo. Fine de 1985 aperis nederlanda libervolulo, Hardo Bourguignon, kiu helpe de Fred de Geus kaj Victor Sadler (kiu denove vivas en Nederlando), provas iniciĝi en la programaron, kun la ideo en 1987 volontuliĝi ĉe UEA kiel civilservanto (anstataŭ soldatservi).

5. Grafika Centro Antverpeno: La situacio dum la jaro restis esence stabila. Jarfine dungiĝis nova grafikisto, Hugo Fontyn, kiu anstataŭas Martine Hollants. Signifa antaŭenpaŝo estis kunligo de la komputilo kun ties kompostmaŝino, tiel ke ĝia kapacito efektive kvarobliĝis. Aliflanke, la kvanto de laboro en GCA forte reduktiĝis, pro maloftiĝo de mendoj de la CO, eksteraj Esperanto-klientoj (precipe pro interrompo de eldona agado de TK/Stafeto) kaj neesperantistaj klientoj. Ĉefa laboro de 1986 devos esti la sistema varbado de pli da kompost- kaj preslaboro.

6. Membraro: En 1985 UEA havis entute 39 556 membrojn, kompare kun 39 195 en la antaŭa jaro. Preskaŭ ĉiuj kategorioj de individuaj membroj montris malgrandajn gajnojn (sume 6 536 kompare kun 6 272, do gajno de iom pli ol 4 procentoj), dum aligitaj membroj iris de 39 195 al 39 556, precipe pro altiĝo de la nombro de junaj aligitaj membroj. La plej grandan nombron de membroj entute havas Pollando kaj la plej granda nombro de individuaj membroj troviĝas en Francio.

7. Societo Zamenhof: Entute 147 membroj en 1985 aliĝis al tiu ĉi societo de mecenatoj de UEA, kompare kun 167 en 1984.

8. Delegita Reto: Ĝenerale la reto restis stabila en 1985, kvankam oni registris etajn kreskojn en pli-mal-

Sija van Wijngaarden (maldekstre), kiu multjare laboris en UEA, parolas kun s-ino Bossong, komitatano.

pli ĉiuj kategorioj. Plej granda kresko estis tiu de Junularaj Delegitoj (de 75 al 104). La Jarlibro de 1985 listigas entute 3 819 delegitajn funkciojn, jene distribuitajn (ciferoj de 1984 troviĝas parenteze): delegitoj 1 244 (1 214), vicdelegitoj 184 (184), junularaj delegitoj 104 (75), Fakdelegitoj 2 287 (2 216). Ili troviĝas en 71 landoj (pasintjare 69).

9. Jarlibro: Pro komputilaj problemoj kaj aliaj konsideroj, necesis redukti la grandecon de la Jarlibro en 1985. La 352-paĝa volumo aperis en julio kaj enhavis ĉiujn esencajn informojn pri la Asocio. La volumo dediĉis apartan atenton al la faka kaj junulara agadoj, i.a. pro la Internacia Junulara Jaro 1985. Redaktis la Jarlibron Stefan MacGill.

10. Eldona agado: Dum 1985 aperis du libroj ĉe UEA. Nova eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, de Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien, aperis en la Jubilea Serio, kaj la romano *Amo kaj morto en Balio*, de Vicki Baum, en traduko de P.H.Mooij, eldoniĝis fine de la jaro.

11. Libroservo: Post tre bona jaro en 1984, denove la Libroservo spertis bonan sukceson. La vendoj sumiĝis je 285 000 gld., kompare kun 280 000 en 1984. Du faktoroj kontribuis al tiu sukceso: vendoj de la pluraj libroj eldonitaj de UEA en 1984 kaj bona sukceso de la Libroservo dum la UK en Aŭgsburgo.

12. Kotizperantoj kaj Ĉefdelegitoj: Pro forpaso de la tieaj ĉefdelegitoj, elektiĝis novaj oficantoj en Aŭstralio (s-ino S. Burkitt) kaj Japanio (s-ro Yamasaki Motohiro), kaj la ĉefdelegitan funkcion en Francio transprenis la landa asocio UFE. Kiel ĉefdelegito en Ĉina Popola Respubliko estis elektita s-ro Dai Song-en.

13. Poŝtmark-vendado: Bedaŭrinde falis al 598 gld. la sumo enspezita pro vendado de poŝtmarkoj en 1985. La Centra Oficejo volonte ricevadas viajn uzitajn poŝtmarkojn por pluvendo profite al la Asocio. La komisiito pri la poŝtmarkvendado ja havas grandan kaj valoran kolekton, kiu certe portos konsiderindan monsumon, kiam eblos dediĉi pli da tempo al la vendado mem.

4. FINANCO

1. Enkonduko: En Aŭgsburgo, la Komitato, surbaze de la ciferoj de 1984 kaj la prognozoj por 1985, timis pri tre granda negativa saldo ĉe la Spezokonto de 1985, kvankam la Buĝeto estas en ekvilibro. Oni povas nun konstati, ke la negativa saldo sumiĝas je 93 575,74 gld., do malpli alta ol en 1984, kaj ke parte ĝi estas rezulto de librotenado.

Principe, la spezokonto enhavas la normalajn spezojn, t.e. kotizojn, plus libroservan profiton, plus diversajn sumojn por kovri la normalajn jarajn kostojn (kiel por niaj eldonaĵoj, revuo, jarlibro), plus fiksajn kostojn (oficajn kaj domajn), plus la salajrojn. La diferenco de la jaraj normalaj enspezoj kaj elspezoj povas esti pozitiva saldo (plej dezirinde) aŭ negativa saldo. Tamen, por scii la financan situacion de la Asocio, oni devas meti tiun saldon en la bilancon. Pro la fakto, ke la Asocio librotenas grandajn donacojn, hazardajn profitojn el investoj kaj kotizojn de diversaj membroj, povas esti, ke la pozitiva aŭ negativa saldo de la spezokonto ne influas la financan situacion de la Asocio: ĉe pozitiva saldo la rezulto povas esti deficito en la kapitalaj kontoj, kaj negativa saldo teorie ne malhelpas eventualan profiton.

Ekzemple, se la kapitalo de la fino de 1985, kiu konsistas el Kapitalo Dumvivaj Membroj (422 646,47 gld) kaj cetera kapitalo (196 310,89), do entute 618 957,36 gld., dum la jaro 1986 subite plialtiĝas pro donaco de 50 000 gld., kaj malplialtiĝas per negativa saldo el la spezokonto de 30 000 gld., la diferenco estas kapitala plialtigo de 20 000 gld., do 638 957,36 gld. Se pro malsukcesinta investo ni devus debeti al kapitalo 30 000 gld., ia pozitiva saldo el la spezokonto de 20 000 gld. ne povas malhelpi, ke la asocio malriĉiĝas je 10 000 gld, do 608 957,36 gld. estus la rezulto.

Por 1985 ni konstatas, ke la kapitalo malaltiĝis, sed per 39 373,02 gld. kaj ne per la negativa saldo de 93 575,74, ĉar ni ricevis donacojn, kotizojn de Dumvivaj Membroj kaj profiton de investoj (12 297,95 gld), kiuj do pozitive influis la kapitalon je entute 54 202,72.

La vera deficito por la jaro 1985 sumiĝas je 39 373,02 gld., relative malgranda sumo por la altaj asociaj rimedoj.

2. Spezokonto: La Estraro kaj la CO sukcesis ne nur teni la elspezojn ene de la buĝetaj limoj, sed malaltigi ilin kompare kun la buĝetita sumo (830 800 gld) per pli ol 90 000 gld. (738 475,16 gld). La negativa saldo fontas el la neefektivigo de kelkaj rimedoj kiel ĉe Antverpena Oficejo (minuso de 120 000 gld. kompare kun la buĝeto), kongreso kaj turismo (minuso de 14 000 gld.) kaj la rento, kiu falis de 52 000 al 26 992,65 (pro investoj en la domo kaj en propraj eldonoj). La negativa saldo de GCA (50 033,33 gld.) estas rezulto de malpli da laboro (ĉefe kompostlaboro) en 1985 kaj du librotenaj elementoj: enkontigo de ĉiujara subvencio en la jaro de la ricevo (por 1985 oni ne povis enkontigi subvencion, ĉar la ricevita apartenis al 1983 kaj jam en tiu jaro estis enkontigita) kaj elspezo de soci-asekuraj krompagoj por la jaroj 1981-1983 en la jaro 1985 mem sen deskribo dum tri jaroj.

La financaj rezultoj de GCA dum la lastaj kvin jaroj sumiĝas je + 184 000 gld., tiel ke la nunjara negativa saldo portas la profiton al 134 000 gld. en 5 jaroj. Alproksimiĝante al la Jubilea Jaro, la Asocio devas garantii bonan funkciadon de la oficejoj, eĉ se tio negative influas la financan situacion.

3. Bilanco: Malgraŭ la malaltigoj de la asocia kapitalo per 39 373,02, la aktivoj kreskis al pli ol 2 500 000 gld, t.e. je 225 000 gld. pli ol dum la antaŭa jaro. La Asocio dankas tiun plialtigon de la rimedoj al la fido de la membraro: la fiksdataj deponoj kreskis per pli ol 100 000 guldenoj en unu jaro kaj la kreditoroj per preskaŭ 190 000 (i.a. pro la personaj kurantaj kontoj de multaj membroj kaj instancoj).

Rimarkinda estas la stabileco en la rubriko de la valorpaperoj kaj la kontinua plialtigo de la libroserva stoko (de 152 957,24 gld. en 1980 al 352 859,35 gld. en 1985).

4. Konkludo: La Estraro prudente uzis la asociajn monrimedojn i.a. por investi en la domo kaj en la libroprovizoj. Du gravaj elementoj en la proponoj por la Jubilea Jaro: digna reprezentiĝo en la centro de Roterdamo kaj pli alta ritmo en la propra eldonado.

Kun la daŭra subteno de la membraro, la Asocio prosperas kaj havas la necesajn rimedojn por organizi vastskalan informadon kaj dignan prifeston de la Centjara Jubileo.

5. INSTITUCIO HODLER '68

La nuna teamo de Institucio Hodler '68 konsistas, pro la subita forpaso de R.W.J. Hubers van Assenraad komence de 1986, el R. Corsetti, H. Bakker, A. Mertens Goossens kaj J. Verstraeten. Kiel adminis-

tranto funkciis J. Rapley kaj kiel konsilanto E.J. Woessink.

La dumkongresa kaj jarfina reagoj al la tre bela, multkolora faldfolio *Movanto en la movado* alportis donacojn, kiuj sumiĝas je preskaŭ 10 000 gld. Mankis tamen la amasa subteno, pri kiu la Institucio iam povis kalkuli.

La luo de la roterdama domo dum la tuta jaro enspezigis pli ol 13 000 gld. Nova lukontrakto por la antverpena domo de la Institucio estas negocata.

La rezultoj en 1985 ankoraŭ ne permesis konsiderindan financan helpon al la Esperanto-movado. Nur Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj ricevis 500 gld.

Sen pli granda reago al la alvokoj de Institucio Hodler '68 por financaj kontribuoj, ĉu per donacoj, ĉu per senrenta prunto por ses jaroj, ĉu per dekjara prunto je 2-procenta rento, la nunaj malhelpoj por financa subtenado de la plej meritplenaj agadoj en la Esperanto-komunumo, malrapide kreskos.

6. PERIODAĴOJ KAJ SERIOJ

1. Revuo *Esperanto:* Geoffrey Sutton redaktis la revuon. La rubriko "Esperanto en radio" restis sub la kompetenta redaktado de Georges Larglantier (Francio). La rubriko "TEJO-paĝo" aperis sesfoje, plej ofte prizorge de la Centra Oficejo.

La 78a jarkolekto (1985) ampleksis kiel kutime 220 paĝojn, ne inkluzivante la kvar kovrilajn paĝojn de ĉiu numero. La aperritmo estis kontentige stabila, kvankam la kongresa numero havis negativan efikon al la aperdatoj de la postaj numeroj.

La plej ofte aperintaj rubrikoj temis pri informado, faka agado, junularo, eksteraj rilatoj, parlamenta agado, literaturo, eldonado kaj lingvistiko. Landoj, pri kies agado la revuo plej ofte raportis, estis FR Germanio, Brazilo, Ĉinio, Svedio, Belgio, Britio kaj Japanio. La redaktoro zorgis, ke la rubriko pri novaj eldonaĵoj, "Laste aperis...", troviĝis en ĉiu ebla numero. La aprila numero havis kvin-paĝan unuan prezenton de la planoj por la Centjara Jubileo. La plej grava numero de la jaro sendube estis la decembra, kiu amplekse raportis pri la rezolucio 23/11.11 de Unesko.

La redaktoro zorgis ankaŭ pri la teknika planado de la revuo, dum la kompostajn, filmajn kaj enpaĝigajn laborojn daŭrigis Grafika Centro Antverpeno (GCA). Dank' al teknika laboro de Fred de Geus, povis komenciĝi surdiska komputila registrado de revuaj tekstoj, kiujn nun rekte dečifras la kompostilo de GCA. Tio ebligas pli fruan redaktan planadon de la enpaĝigo, sed antaŭkondiĉas la tajpadon de preskaŭ ĉiuj tekstoj en la Centra Oficejo, kio espereble donos malaltigon de la kompostokostoj. S-ino Rejna de Jong akurate helpis provlegi la kompostaĵojn, kiel ankaŭ Rob Moerbeek de la Centra Oficejo, kies lingva kontrolado estas de alta valoro.

Dum 1985 la revuo havis 6 503 abonantojn, kio montras feliĉigan kreskon de iom pli ol 5%. La meza eldonkvanto tamen restis 7 800 ekz., kiel en 1984. El pagitaj anoncoj la revuo enspezis iom pli ol 12 000 guldenojn, kompare kun pli ol 14 300 gld. en la antaŭa jaro, sed 10 600 en 1983.

2. *Kontakto*: Ĉi tiu revuo aperis daŭre sub la redaktado de Anna Brennan (lingve simpla parto) kaj de Leif Gunnar Nordenstorm (cetera parto). Pretiĝis ses numeroj, kiel planite, pri ses diversaj temoj: lingvo kaj lingvoj, Afriko, Internacia Junulara Jaro, antikvo kaj moderno, amikeco, akvo. Pri la teknika redaktado (administrado, planado) zorgis Stefan MacGill en la CO, dum kompostis, enpaĝigis, presis kaj ekspedis ĝin Grafika Centro Antverpeno.

La kvanto de individuaj abonoj al *Kontakto* bedaŭrinde falis (de 462 al 409). Aliflanke la kolektivaj abonoj montris multe pli pozitivan tendencon. Altiĝo de pli ol 45% portis la kvanton al 894. Pro la fakto, ke ankaŭ la kvanto de junaj membroj kaj de patronoj de TEJO altiĝetis, la tuta eldonkvanto kreskis je 280. Al tiu kresko forte kontribuis Fondaĵo Azio-Afriko, kiu pagas plurajn centojn da abonoj por legemuloj en Afriko.

3. *Esperanto-dokumentoj*: Dum 1985 aperis sep Esperanto-dokumentoj: nova, ĝisdatigita eldono de *La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo* (de Germain Pirlot) en Esperanto, tradukoj angla kaj franca de *Monda Komunika Jaro: Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado* – parolado de Richard E. Butler (el la UK en Budapeŝto), kun komentoj de Humphrey Tonkin. Por Internacia Junulara Jaro aperis *Historio de TEJO* (de Norberto Saletti), kaj por la turisma agado *La lingva problemo en turismo*. Ambaŭ aperis en kaj Esperanto kaj la angla. La dokumenton pri turismo oni vaste utiligis dum la Ĝenerala Asembleo de Monda Turisma Organizo, okazinta en Sofio (septembro 1985).

7. KONGRESOJ

1. La 70a Universala Kongreso de Esperanto: La Kongreso okazis en Aŭgsburgo, FR Germanio, de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto kun 2 311 aliĝintoj el 50 landoj. La kongresa temo estis "Antikvo kaj moderno – kion ŝanĝi, kion konservi?" Krome, la Kongreso omaĝis i.a. la 40an datrevenon de UN per aparta Tago de la Paco, kiu ekde nun estos konstanta programero de ĉiu UK.

La Alta Protektanto de la UK estis Richard von Weizsäcker, Federacia Prezidento de FR Germanio. Kiel provinca urbo, Aŭgsburgo allogis malpli da ŝtataj reprezentantoj ol kutime. Atentinda estis denove la saluttelegramo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, plene dediĉita al la kongresa temo.

Kvankam la nombro de la kongresanoj superis la atendojn – tial la Kongresa Libro devis aperi en du eldonoj! – la kongresejo montriĝis tre oportuna: bonaj salonoj, abunda spaco por giĉetoj kaj rendevuoj, adekvataj surlokaj manĝejoj ktp. Malpli taŭgis la ejoj en apuda lernejo, kaj la inaŭgurejo, urba sporthalo, pro ĵus komencitaj konstrulaboroj aspektis improvizite kaj malhavis konvenan etoson. La grandeco de la kongresanaro montriĝis i.a. en tio, ke la ekskursa servo vendis 1 800 biletojn kaj la loĝiga servo peris pli ol 1 500 tranoktejojn. La libroservaj vendoj atingis la rekordan sumon de pli ol 60 000 gld.

LKK bone laboris antaŭ kaj dum la UK. Bone prizorgata estis la gazetara servo. Lokaj gazetoj, precipe *Augsburger Allgemeine Zeitung* (325 000 ekz.), abunde informis pri la Kongreso. Okazis ankaŭ ses intervjuoj kun regionaj radiostacioj, krome tri intervjuoj por la germana kaj 5 por alilingvaj elsendoj de Deutsche Welle (Germana Ondo). Bavara Radio raportis pri la inaŭguro ankaŭ televide. La tutlanda servo de la Finna Radio sendis raportiston, same – jam tradicie – la Eo-redakcioj de Radio Polonia (Varsovio) kaj Radio Pekino.

Menciindas ankaŭ la kultura Eo-manifestacio sur la urboplaco, al kiu ĉefe kontribuis la Internacia Ĥoro sub la gvido de D. Terziev. Pri informado de la kongresanoj respondecis teamo de *Monato*, kiu redaktis la profesinivelan kongresan kurieron, *La strobilo*.

Dank' al la klopodoj de LKK lokaj instancoj donis grandan moralan kaj financan subtenon al la Kongreso. La ĉefurbestro akceptis ĉ. 200 kongresanojn en la urbodomo, dum deko da personoj reprezentis la kongreson en speciala aranĝo pro la urba pacfesto.

Enketo, kiun respondis 142 kongresanoj, montris, ke apud la kulturaj programoj, tre sukcesaj estis la klerigaj. Internacia Kongresa Universitato, kies rektoro estis prof. d-ro Helmar Frank, konsistis el naŭ prelegoj. En la 8a Esperantologia Konferenco ses prelegantoj pritraktis la lingvon, dum la kongresa temo estis traktata en tri sesioj, kun William Auld kiel la reĝisoro. Pri la du unuaj oni tamen plendis, ke apenaŭ restis tempo por diskuto post la prelegoj.

Laŭ la enketrespondoj precipe novaj kongresvizitantoj ne kontentas pri la formo de la Interkona Vespero. Tiu demando aperis ankaŭ en speciala kunsido, kiun partoprenis 15 unuafojaj kongresanoj. Laŭ ilia sugesto aldoniĝos al la programo de estontaj UK-oj aparta "enkonduka" kunveno por novaj kongresanoj.

Antaŭ Aŭgsburgo okazis enketo inter la komitatanoj pri estontaj celoj kaj formoj de niaj kongresoj. Ne estis facile ekstrakti komune akceptitan modelon de UK, sed oni daŭre antaŭvidas grandajn kongresojn kun varia kaj abunda programo, dividita en laboran kaj festivalan partojn.

Kun la 70a UK finiĝis la deĵorperiodo de la Konstanta Kongresa Sekretario Diccon Masterman, kiu kunordigis kvar Universalajn Kongresojn.

2. Spezoj: La spezoj de la 70a UK ankoraŭ ne estis finsalditaj. Tamen, ankaŭ el financa vidpunkto Aŭgsburgo ŝajnas esti kontentiga.

3. La 22a Internacia Infana Kongreseto: Entute 44 infanoj el 13 landoj partoprenis la 22an IIK. Al la sukceso de la kongreseto kontribuis aparte talentaj gvidantinoj, same kiel la favoraj kondiĉoj en trankvila antaŭurba loko. Ĉiuj infanoj kune salutis ankaŭ la Inaŭguron de la UK. Ŝajnas, tamen, ke por certigi la konstantecon de la Infanaj Kongresetoj, necesas taŭgaj organizaj solvoj, ĉu starigo de komisiono ĉu komisiito pri IIK.

4. La 41a Internacia Junulara Kongreso: Ĝi okazis dum la semajno antaŭ la UK en Eringerfeld, FR Germanio. Vidu la ĉapitron 11.7.

5. Estontaj kongresoj: La Universala Kongreso de la Jubilea Jaro okazos en Varsovio de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1987. Estas definitive decidite kongresi en 1988 en Roterdamo kaj en 1989 en Brajtono, Britio. Daŭras la sondado pri ebleco okazigi la unuan UK-on en Afriko en 1990, eventuale en Abiĝano, Ebura Bordo.

Sceno el la teatrajo* La aŭgsburga kretocirklo *de Berthold Brecht, prezentita en la pasintjara UK.

8. JUBILEA JARO, INFORMADO

1. Centjara Jubileo: La preparoj por la Centjara Jubileo daŭras ĉe UEA, same kiel sur landa kaj loka niveloj. Ampleksa raporto pri tio aperis en *Esperanto* de marto 1986. Al la Jubilea Kolekto "Jarcento de Esperanto" aldoniĝis kvina, korektita eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. La sekva verko, aperonta en la serio, estas la nova antologio de Esperanta prozo, kies manuskripto jam pretiĝis. La baza informlibro *La fenomeno Esperanto* de William Auld estas tradukata en plurajn naciajn lingvojn.

2. Komisiono pri informado: En Aŭgsburgo okazis Seminario pri Informado, kies celo estis trovi la

motivojn de la rezisto kontraŭ Esperanto fare de la ĝenerala publiko, kaj provi solvi tiun problemon. Ĝi alprenis plurajn gravajn bazajn konkludojn: 1) trejni informcele la aktivulojn; 2) starigi servocentron por kolekti la ĝisnunajn spertojn; 3) verki praktikajn konsilarojn; 4) kontakti specialistojn pri la temo por profiti el ties konsiloj; 5) difini prioritatajn celgrupojn. Okaze de la seminario estis publikigita la gvidilo por gazetaraj servoj *Kiel rilati kun la gazetaro* de Germain Pirlot.

3. Kongresa informado en Aŭgsburgo: La 70a UK en Aŭgsburgo ricevis rimarkindan atenton fare de la lokaj kaj landaj instancoj (vidu la ĉapitron 7, "Kongresoj").

4. Landaj informlaboroj: La pasintjaraj informlaboroj en la unuopaj landoj elstariĝas per la vasta diverso de la tuŝitaj kampoj. En januaro la belga televido elsendis 10-minutan programon pri Esperanto, ĉe kiu intervjuiĝis la prezidanto de UEA. La bulgara entrepreno Ekran kreis la 25-minutan filmon *Leciono de Esperanto*, kiu estis telesendita. Ambaŭ programoj vekis grandan intereson pri la lingvo kaj gazetaran reagon. Televidaj informprogramoj pri Esperanto estis elsenditaj ankaŭ en Brazilo. En Japanio furoris la animita filmo *Nokto de la galaksia fervojo*, kun Esperantaj skriboj kaj kantado.

En septembro tajdis en Nederlando informa ondo pri la Internacia Lingvo sur la paĝoj de la informa libreto *AO* kaj per lecion-kajero ĉe la eldonejo IVIO, kiu ĝin vaste distribuis al miloj da daŭrigaj lernejoj.

En populara muzikprogramo de la Finna Radio en januaro, Harri Melasniemi dum unu horo povis vaste informi pri la kulturo kaj movado de Esperanto.

Modele laboras la franclingva gazetara servo de la Belga Esperanto-Federacio, kiu pasintjare sukcesis aperigi pli ol 250 leterojn kaj artikolojn pri la Internacia Lingvo en la belga gazetaro. Ankaŭ en kelkaj aliaj landoj okazas simila agado (Britio, FR Germanio, Brazilo).

Rüdiger Eichholz eldonis la faldfolion *Interkompreno per Esperanto, la interetna lingvo*, kiu ĝis nun aperis en 26 lingvoj. Antaŭvideblas eldonoj en pliaj lingvoj.

Menciendas la agado de Unuiĝo Franca por Esperanto (vd. *Esperanto*, novembro 1985), kiu i.a. pro siaj iniciatoj sur informa kampo estis premiita per la Trofeo Fyne.

5. Aliaj informaj agadoj: La franca studento Alexandre Rousset utiligis sian devon plenumi praktikan staĝon kiel eron de siaj studoj por servi kiel volontulo de UEA en Bolivio. Per prelegoj en universitataj medioj kaj intervjuoj en gazetoj kaj radio li, kune kun la delegito en La Paz d-ro José Roberto Arze, sukcesis veki intereson pri Esperanto. La estonteco montros, ĉu tiu intereso daŭros.

9. EKSTERAJ RILATOJ

1. Unuiĝintaj Nacioj: Temis pri jaro de intensa agado ĉe UN. Kvankam jam en 1984 pro financaj kaj aliaj kialoj, UEA devis rezigni pri aparta oficeja ĉambro, kaj kvankam la nuna aranĝo, laŭ kiu la Asocio dividas kun du aliaj organizaĵoj unu laborejon, nature malfaciligas la laborajn kondiĉojn, grupo da volontuloj diligente laboras por Esperanto ĉe UN. Dum 1985, ekzemple, volontuloj dediĉis 717 horojn al laboro en la oficejo, kaj reprezentantoj de UEA ĉeestis entute pli ol 70 kunsidojn de diversaj UN-komitatoj. La manko de plena oficeja ĉambro tamen ebligis ŝparojn je lukostoj, kio siavice produktis pli da rimedoj por praktika agado.

Dum granda parto de la jaro, laboris kiel salajrata direktoro s-ino Nancee Medrano, kiu eksiĝis en aŭgusto por repreni siajn universitatajn studojn. En septembro respondeco pri la ĝenerala administrado transiris al la universitata oficejo de d-ro Humphrey Tonkin, sub kies gvido nun regule aperas la novaĵletero, kaj la nombro de Amikoj, Subtenantoj kaj Patronoj de la oficejo iom rapide kreskas. La nova aranĝo ebligis pliajn ŝparojn kaj malfermis al UEA la modernajn oficejajn instalaĵojn de la universitato. Rezulte, intensiĝis la korespondaj kontaktoj kun UN-ambasadoroj kaj fakoj de UN, komencis aperi okazaj gazetaraj komunikoj, kaj pliboniĝis ankaŭ la kontaktoj kun la Esperanto-gazetaro.

La estraro de la oficejo renkontiĝas ĉiumonate. Ĝi grandparte respondecis pri organizado de dutaga faka konferenco en decembro, kaj ĝi organizis specialan bankedon la 13-an de decembro ĉe la Urba Universitato de Novjorko, ĉe kio, en ĉeesto de sepdeko da homoj, s-ro Robert Muller, asista ĝenerala sekretario de UN, ricevis el la manoj de la prezidanto de UEA la unuan Premion Zamenhof por Internacia Kompreniĝo, iniciato de la Novjorka Oficejo. Aljuĝo de la premio donis bonan okazon por diskonigo de UEA kaj Esperanto en UN-rondoj. La fakto, ke ĝi koincidis kun la rezolucio de Unesko pri Esperanto, ebligis intensan informan kampanjon ĉe la UN-misioj kaj en la sekretariato.

Jam de kelkaj jaroj la estraro flegas proksimajn rilatojn kun la Traduka Fako de UN, kiu kunlaboras interalie en la jam tradicia Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado de CED (vidu ĉapitron 14). Ĉi-jare la Traduka Fako fariĝis kunorganizanto de la konferenco, kiu do estiĝis Konferenco de CED kaj de la Traduka Fako de UN.

Kiel kutime, kunsido pri UN-agado okazis en la UK, kaj la kvardeka datreveno de UN estis aparte atentata, interalie per pendigo de la flago de UN antaŭ la kongresejo. La informilo UN kaj Ni regule aperis sub redakto de s-ino Akiko Woessink-Nagata, raportante interalie pri aktualaj ŝanĝiĝoj en la lingva situacio en UN kaj Unesko. Estis sentebla kresko de

agado ĉe UN en Ĝenevo, kie nun reprezentas UEA d-ro György Nanovfszky. Respondecon pri simila agado en Vieno daŭre bone plenumis d-ro Hans Michael Maitzen.

2. Unesko: La 8an de novembro, la 23a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion pri Esperanto kaj ĝia Jubilea Jaro. Rekonante la iaman rezolucion, akceptitan de la Ĝenerala Konferenco en Montevideo en 1954, kaj "memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj," la nova rezolucio "gratulas la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno," petas la Ĝeneralan Direktoron de Unesko "daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto" kaj invitas la Ŝtatojn-Membrojn "marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj." Ĝi krome alvokas la diversajn ŝtatojn "instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado," kaj petas ankaŭ la kunlaboron de la internaciaj neregistaraj organizaĵoj.

Tiu rezolucio estas eventuale la plej grava atingo en niaj rilatoj kun Unesko en tridek jaroj. Ĝi estas rekta rezulto de efika kunagado inter la surloka laborgrupo en Parizo, kiu flegas la rilatojn kun Unesko, la estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la komisiito de UEA ĉe la Ĝenerala Konferenco en Sofio, s-ro Tibor Sekelj. Precipe ĉi tiu, kiu fervore kaj efike kuntiris la fadenojn en Sofio, varbante la subtenon de la jugoslava delegacio kaj la kunlaboron de la kunsubskribantoj de la rezolucio, tiel ke finfine, post efika argumentado ankaŭ en la pleno, eblis la tuton porti al sukceso, meritas laŭdojn. Samtempe, tamen, UEA rikoltis la rezultojn de zorga, plurjara flegado de kontaktoj kun la sekretariato de Unesko kaj precipe la Ĝenerala Direktoro, s-ro M'Bow. (Vd. la raporton de Tibor Sekelj en la revuo *Esperanto*, pĝ. 201-204.)

Tra la tuta fina periodo de 1985, okazis intensa agado en UEA por ekspluati ĉe la publiko la sukceson – laboro, en kiu bone kunagis la landaj asocioj. Samtempe, tamen, okazis dua granda sukceso: t.n. Eksperta Konferenco pri Plurlingveco kaj Komunikado, kunveno kunvokita de UEA kun subvencio de la Sektoro pri Komunikado por studi la problemojn de internacia lingva komunikado. Tiu kunveno okazis, en ĉeesto de lingvistoj el la tuta mondo, de la 25a ĝis la 27a de novembro en la Unesko-Domo (vd. revuon *Esperanto*, 1986, pĝ.3-4). Oni antaŭvidas baldaŭan aperigon de la prelegaro, prezentita de 21 specialistoj el dek landoj, sub redakto de d-ro Lo Jacomo, kunorganizinto de la konferenco.

Trie, menciinde estas, ke la Centjariĝo de Esperanto troviĝas en la listo de Unesko pri grandaj mondaj jubileoj en 1986-87, dank' al iniciato de Jugoslavio.

Temas, do, entute, pri jaro de vere brilaj sukcesoj. Tiuj brilaĵoj tamen ne forgesigu la rutinan laboron, kiu parte ebligis ilin – ekzemple la laboron ĉe neregistaraj organizaĵoj (fare de s-ro E. Chicot, s-ro P. Guerout kaj d-rino B. Despiney), partoprenon en laborgrupoj pri junularo, komunikado, homaj rajtoj, virinoj kaj internacia kompreniĝo, nek la fakton, ke UEA prezidas la laborgrupon kaj kolokvon pri junularo en la sino de la neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko. UEA estis reprezentita i.a. en la Unesko-Kongreso pri Internacia Junulara Jaro (Barcelono, julio) kaj la Konferenco de UN pri la Jardeko de Virinoj (Najrobo, julio). Pri ĉi tio vd. en *Esperanto*, pĝ.183, 1985.

3. Aliaj interŝtataj organizaĵoj: Laboro pri Esperanto ĉe Monda Turisma Organizaĵo daŭras, kvankam pro diversaj kialoj oni ne povis prezenti rezolucion pri la lingvo en la Ĝenerala Asembleo de MTO en septembro (vd. en *Esperanto*, pĝ. 182). UEA aperigis broŝuron pri turismo kaj Esperanto kunlige kun la kunsido de la Asembleo, kaj estis organizita flanke de Bulgara Esperantista Asocio kaj UEA internacia simpozio pri "La lingvaj obstakloj al la libera evoluo de turismo" en la tagoj tuj antaŭ tiu kunsido. Partoprenis homoj el 11 landoj, inkluzive la prezidanton de UEA.

Daŭras kontaktoj kun Alekso (arablanda organizo simila al Unesko), precipe pere de kontaktoj de UEA en Tunizio.

Per la konstanta kontribuo de la plimulto de la dek landaj asocioj, kiuj kunlaboras en Eŭropa Esperanto-Unio, la monrimedoj de Eŭropa Esperanto-Centro sufiĉis en 1985 por daŭre parttempe dungi s-inon Anne Tilmont kaj lui taŭgan oficejon por ŝia kunordiga laboro. Belga Esperanto-Federacio helpis per pago de parto de la luo kaj la kosto de elektro, telefono ktp. Okazis daŭraj kontaktoj kun la Komisiono kaj la Parlamento. Por Brusela Esperanto-Grupo tiuj bonaj rilatoj finfine konkretiĝis en disponigo de kursejo kaj kunvenejo en la domo de la Komisiono mem. Denove plialtiĝis la nombro de oficistoj en la Komisiono, kiuj scipovas Esperanton.

EEC organizis akcepton por parlamentanoj de Eŭropa Komunumo dum la UK en Aŭgsburgo, kaj eŭropa parlamentano Dieter Rogalla simbole transdonis al la kongreso malfermitan landlimbarilon. Ĉe la verdulaj frakcioj en kelkaj landoj oni preparis rezolucion pri Esperanto, kiu nun trairas la partiajn kongresojn por eventuale atingi la parlamenton en Strasburgo.

4. Nacia agado: Laboro ĉe la internacia nivelo apenaŭ povus sukcesi sen bona enlanda laboro. Landaj asocioj en multaj landoj tenas bonajn kontaktojn kun siaj parlamentanoj, ministerioj, Unesko-komisionoj ktp., tiel ebligante intervenon subtene al agado je la internacia nivelo kaj atingante difinitajn sukce-

sojn enlandajn. La sukcesigo de la lastatempa Unesko-rezolucio estas bona ekzemplo de la graveco de tiuj naciaj kontaktoj, ĉar gravan rolon ludis tiuj landaj asocioj, kiuj intervenis ĉe siaj instancoj. Aparte laŭdindaj estas la agadoj en, ekzemple, Aŭstralio, Britio, Hungario, Jugoslavio, Ĉinio, Japanio, Hispanio, Svedio, Bulgario, FR Germanio , Germana DR, Kubo kaj Brazilo.

10. KULTURO KAJ EDUKADO

Kulturo: ĝenerala superrigardo: Antaŭ kvin jaroj, kiam la verkinto de ĉi tiu parto de la Estrara Raporto transprenis la gvidon de la fako "Kulturo kaj Edukado" en la Estraro de UEA, estis lanĉita diskutado pri la kulturpolitiko de la Asocio per cirkulero, sendita al ĉiuj komitatanoj, aliĝintaj landaj asocioj kaj pluraj artistoj, eldonistoj kaj aliaj kulturagantoj en la movado. La celo de tiu diskutado estis kolekti opiniojn kaj proponojn por intensigi kaj variigi la kulturan agadon de la Asocio. Lige kun tiu klopodo aperis du artikoloj, verkitaj de la estrarano pri kulturo, en la revuo jam en 1981: *Memornotoj pri kulturpolitiko* (p.64) kaj *Tra informiĝo al kulturgenero* (p.205). En tiu jaro, kaj ankaŭ daŭre dum la sekvanta, alvenis abundo da reagoj al tiu iniciato, senescepte pozitivaj, kvankam malegale disvolvitaj. Ĉiuj tamen esprimis la opinion, ke UEA estas unuavice kultura asocio kaj ke nepre necesas, ke ĝi laŭpove iniciatu kaj subtenu kulturajn aranĝojn kaj entreprenojn. En la sekvaj jaroj tamen evidentiĝis, ke praktike tie daŭre prezentiĝas baroj. La plej obstakla sendube estas la financa; estus bele, se UEA povus monsubteni, ni diru, diversajn amatorajn kaj profesiajn teatrajn grupojn, kiuj kuraĝas dediĉi siajn tempon kaj energion al drama praktikado en nia lingvo, kio evidente havas gravan publikan valoron; bedaŭrinde mankas la monrimedoj. Alian subtenindaĵon oni povus mencii: ebligi al la koncerna estrarano pri kulturo ĉeesti de tempo al tempo kulturajn aranĝojn diverslande, esperantistajn kaj neesperantistajn, por akiri spertojn kaj stimuliĝon por sia laboro kaj por transdoni al esperantistaj kulturarangantoj kaj partoprenantoj la impreson de vera interesiĝo kaj subteno de nia Asocio por iliaj entreprenoj. Lastatempe ekestis ankaŭ la teoriaj eblecoj partoprenigi niajn poetojn en internaciaj poeziaj festivaloj, sed por tion praktike ebligi mono estas bezonata. Ankaŭ estus bele, se UEA disponus pri aparta fondaĵo por subteni tiajn eventualajn partoprenojn (ĉi-rilate estas aparte menciinda la agado de s-ro P.H. van Terwisga, kiu jam multe laboris sur ĉi tiu kampo).

Estas tiom da aferoj, kiuj indas subtenon de UEA en la kultura sfero. Ni bezonas pliajn kulturvortarojn similajn al *Enciklopedieto japana*. Ni bezonas praktikajn gvidilojn pri la landoj kaj kulturoj de la mondo, precipe la malpli konataj. Fakte projekto por tiaj informiloj jam estis lanĉita antaŭ tri jaroj, kiu ĝis nun tamen malkontentige progresis, ĉefe pro manko de kunlaborantoj, malgraŭ kelkaj klopodoj tiajn akiri pere de anoncoj, artikoloj kaj korespondado. Mankas pli da kulturaj komisionoj ĉe la landaj asocioj, komisionoj, kiuj pretas kunlabori kun UEA; mankas pli aktiva informado pri la libromerkato en Esperanto sur lokaj niveloj; mankas aparta recenza revuo, kiu disponas pri kvalifikitaj, regulaj recenzistoj; mankas establo de konstanta kunlaboro inter Esperanto-kulturentreprenoj, kaj aparte flanke de UEA, kun naciaj kulturinstancoj; mankas pli aktiva kunlaboro inter esperantistaj artistoj – tie UEA povus kunhelpi kiel interaganto. Tian liston oni povus plilongigi, sed tio apenaŭ havas sencon dum la financaj rimedoj kaj homfortoj de UEA restas tiel limigitaj, kiel nuntempe estas. Eble tamen ŝanĝitaj emfazoj en la financa politiko de la Asocio povus iel korekti la situacion, se ekestus intereso kaj kompreno pri tio.

Se oni konsideras, ke jam ekzistas tiom da ideoj kaj proponoj por kultura aktivado de UEA (vd. ekzemple la jam menciitan artikolon en la decembra numero de la revuo 1981), ne ŝajnas tre saĝe konstante aldoni rezoluciojn pri novaj taskoj sur tiu kampo sub la nunaj cirkonstancoj. Sen pli da homfortoj kaj financaj rimedoj por kulturaj aferoj novaj decidoj pri pliaj farendaĵoj restos nur sur la papero.

Pri kulturaj laboro kaj eventoj dum 1985 tamen estas menciindaj kelkaj punktoj:

1. La jubileaj planoj: Sub prizorgo de André Staes, Belgio, daŭre progresis la kolektado de informoj pri la planoj de la landaj asocioj okaze de la Jubilea Jaro, i.a. sur la kultura kampo (vd. artikolon en la aprila numero de la revuo 1985). Ĉu UEA povos tie helpi, krom per instigado kaj konsilado, restas tamen demando. Aparta agado de UEA ĉefe koncentriĝos je eldonado de kulture valoraj libroj en la eldonserio Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, kies unua volumo, *Esperanta antologio: Poemoj 1887-1981*, jam aperis.

2. Teatra gvidlibro: En Aŭgsburgo la Komitato komisiis al la Estraro esplori pri la ebleco kompili kaj eldoni gvidlibron pri teatraj festivaloj, kie dramoj en Esperanto estas prezentataj, kaj pri teatraj grupoj, kies repertuaroj inkluzivas Esperantajn dramojn, kun la celo vaste publikigi la agadon de la teatraj grupoj kaj faciligi la taskon al tiuj, kiuj preparas artajn programojn por kongresoj kaj aliaj kulturaj manifestacioj. Jam okazis interkonsiliĝo inter la estrarano pri kulturo de UEA kaj la estrarano pri kulturo de TEJO, Norberto Saletti, pri tiu tasko, pri kiu TEJO sin jam okupas.

3. Teatro: En la kadro de la 70a UK Bulgara Esperanto-Teatro (BET) prezentis du dramojn, *La aŭgsburga kretocirklo*, bazitan sur rakonto de Bertold Brecht, kaj *Tri viroj en neĝo*, bazitan sur rakonto

de Erich Kästner. Teatraj prezentaĵoj jam delonge fariĝis tiaj tradiciaj okazaĵoj dum la Universalaj Kongresoj, ke ili postulas profesian prezentadon. Tian profesiecon ja montras BET, kiu jam multfoje pliriĉigis la kulturan enhavon de la kongresaj programoj, kio estas aparte laŭdinda kaj dankinda.

4. Belartaj Konkursoj: Por 1985 konkursis entute 142 verkoj de 87 konkursantoj, kio montras konsiderindan kreskon ekde la lasta jaro (tiam 115 verkoj de 5 konkursintoj). Ĉiuj premioj estis ĉi-foje aljuĝitaj escepte de la branĉo Kanto, kiu denove malsukcesis laŭ la juĝintoj. Laŭ decido de la Komitato estos speciala premio pro paca temo en 1986.

5. Fondaĵo Grabowski: Pro kulturaj meritoj serve al la Esperanto-movado ricevis premiojn el la fondaĵo István Nemere, Christian Bertin kaj Dante Bertolini. La eldonejo Ludovikito kaj la kulturrevuo *Fonto* ricevis monsubtenon.

6. Edukado: Sur la kampo de instruaj aferoj la plej grava priraportaĵo sendube estas *la restarigo de kunlaboro inter UEA kaj ILEI* post kelkjara stagno. El dumkongresaj kunsidoj de la Estraro de UEA kaj la nova estraro de ILEI rezultis plena interkonsento pri renovigo kaj neceso de tia kunlaboro. Surbaze de tiuj intertraktoj la Komitato de UEA komisiis al la estrarano pri edukado trakti kun la estraro de ILEI programon unuecige taŭgan por la edukado de esperantistaj kursgvidantoj, surbaze de jam preparita materialo fare de membroj de la Eduka Komisiono de UEA. Tiu materialo (instruprograma projekto por kursgvidantoj) estis sendita al la estraranoj de ILEI por pritrakto, kaj al ĉiuj landaj asocioj por informo kaj komentoj. Dum la 3a Internacia Metodika Seminario en Bad Saarow ĝi estis aparte traktita de fakuloj, kiuj interkonsentis pri tio, ke necesas praktike elprovi la instruprograman projekton, tiel ke spertoj haviĝas pri ĝia utiligeblo. Ekestis la ideo organizi kelkpersonan internacian kurson por tiu eksperimento, antaŭvideble en Hungario en 1986.

7. La Tago de la Lernejo: La 4a Tago de la Lernejo okazis en Aŭgsburgo. La programon organizis, sub gvido de la Konsulta Komisiono de UEA pri edukado, ges-roj Zsuzsa Barcsay kaj Hermann Behrmann, kunlabore kun Gerald kaj Stefanie Tucker. Post saluto de s-ro Luchner, reprezentanto de la Ministerio pri Kulturo en Bavario, enkondukis la Tagon Baldur Ragnarsson, estrarano pri edukado ĉe UEA. Reprezentantoj el Ĉinio, Ruando, FR Germanio, Irano, Islando, Hungario kaj Pollando raportis pri la instruado de Esperanto en siaj landoj en rilato kun la ĉeftemo de la Tago, "Kiel plivastigi la instruadon de Esperanto". Apartan atenton vekis raporto el Islando pri eksperimento uzi Esperanton en luda programo por instrui bazajn sociologiajn ideojn al 7-ĝis 8-jaraj infanoj. La nova prezidanto de ILEI, prof. István Szerdahelyi, salutis en la nomo de la ligo, kies tuta estraro ĉeestis la Tagon, akcentante la neceson de intima kunlaboro inter ILEI kaj UEA pri instruaj aferoj. Okazis ankaŭ modellecionoj pri poezio, fare de Baldur Ragnarsson, kaj pri geografio, fare de s-ino Tucker. Poste okazis ĝenerala diskutado pri la diversaj aspektoj de la instrua situacio de la lingvo, kiun fine resumis Baldur Ragnarsson, elmontrante la ĉefajn obstaklojn al la instruado de la lingvo: nescion de la publiko kaj de edukaj instancoj, malfavoron de lingvoinstruistoj, kiuj emas rigardi Esperanton kiel minacon al siaj profesioj, mankon de modernaj lernolibroj kaj alia instrumaterialo, mankon de kompetentaj Esperanto-instruistoj kaj kursgvidantoj, mankon de informado pri la jamaj praktikaj avantaĝoj, kiujn donas scio de la Internacia Lingvo, superplenajn instruprogramojn en la lernejoj. La rimedoj por tion plibonigi estas unuavide pli celkonscia informado sur publika kaj instanca nivelo kaj faka preparado por tiuj, kiuj celas instrui la lingvon.

8. Ekzamenoj: Post unujara paŭzo okazis por la dua fojo la Internaciaj Ekzamenoj de UEA, sub gvido de la prezidanto de la Ekzamena Komisiono, s-ro Gerald Tucker. Du personoj sukcese trapasis la elementan ekzamenon, dum dek kvar personoj akiris la mezgradan diplomon.

11. JUNULARA SEKCIO
(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

1. Enkonduko: Ĉefaj aktivecoj de TEJO en 1985 estis firme ligitaj kun la Internacia Junulara Jaro (IJJ). Dum la gravaj eventoj de IJJ, TEJO vekis grandan interesiĝon pri Esperanto inter la gejunuloj de ĉiuj kontinentoj kaj diversaj junularaj organizoj. Ĉefa interna IJJ-aktiveco estis eksterordinare sukcesa Internacia Junulara Kongreso (IJK).

Finfine, dum la IJJ oni rekonsideris la rilatojn inter TEJO kaj UEA: UEA aprobis novan TEJO-regularon, pri kio laboris multaj aktivuloj dum almenaŭ du lastaj jaroj. Kelkaj aliaj iniciatoj, i.a. ligitaj kun la Jubilea Jaro pozitive markas la agadon de la junulara sekcio de UEA en 1985.

2. Komitato: La Komitato, la supera gvidorgano de TEJO, kunsidis dum la 41a Internacia Junulara Kongreso en Eringerfeld. Ĝi konsistas nun el 51 personoj: 36 A-komitatanoj (nomitaj de la landaj kaj fakaj sekcioj), 7 B-komitatanoj (elektitaj de la A-komitatanoj) kaj 8 C-komitatanoj (estraranoj, ne jam A aŭ B).

La Komitato akceptis unuanime la novan Regularon de TEJO, kiu estas aprobita de la Komitato de UEA. La regularo i.a. nuligas la Interkonsenton de Beograd, vortumas novan Statuton de TEJO kaj ŝanĝas la strukturon de la Komitato mem. En 1986 la Komitato konsistos el A-komitatanoj, nomitaj de la unuopaj sekcioj; B-komitatanoj, elektitaj de la indivi-

duaj membroj; C-komitatanoj, elektitaj de la komitatanoj A kaj B; kaj la estraranoj.

Pere de komisionoj, la Komitato laboras dum la tuta jaro. La Komitato rekomendis al la estraro starigi ses komisionojn: Aktivula Trejnado (gvidas Jarek Parzyszek el Pollando), Eksteraj Rilatoj (Elisabeth Schwarzer, FR Germanio), Jubilea Jaro (Ian Jackson, Honkongo), Kongresoj (Martin Haase, FR Germanio), Landa Agado (Marié Vančurova, Ĉehoslovakio), Scienca Aplikado (Zs. Kóródy Barosné, Hungario).

3. Estraro: 1985 estis elektojaro por TEJO. Dum la IJK en Eringerfeld, la Komitato elektis okhoman estraron, kiu agos dum la dujara oficperiodo. Ian Jackson reelektiĝis prezidanto. La ceteraj estraranoj kun ties fakoj estas: Jan Koszmaluk el Pollando (ĝenerala sekretario), Alex Humet, kataluno loĝanta en Belgio (kasisto, rilatoj kun aliaj UEA-organoj), Marié Vančurova (unua vicprezidanto, landa agado), Martin Haase (dua vicprezidanto, kongresoj), Elisabeth Schwarzer (eksteraj rilatoj), Jarek Parzyszek (aktivula trejnado, membraro), Norberto Saletti el Italio (kultura kaj faka agadoj).

La estraro kunsidis komence de 1985 en Prago, okaze de oficiala kunveno kun Internacia Unuiĝo de Studentoj kaj en Eringerfeld kadre de la IJK. Dum la 70a UK en Aŭgsburgo okazis komuna estrarkunsido de TEJO kaj UEA; tra la jaro okazis pluraj neformalaj kunvenoj de estraranoj.

4. Membraro: Dum la kategorio Juna M-Jarlibro el la individuaj membroj restis pli malpli ĉe la ciferoj de 1984, la Junaj M-Abonantoj signife plinombriĝis (de 192 al 229), same kiel la Junaj Aligitaj Membroj, kies nombro kreskis de 9463 al 9766. Malkreskon de individuaj abonoj al *Kontakto* kompensis abundo da novaj kolektivaj abonoj (de 610 al 894). Ankaŭ la nombro de Patronoj de TEJO favore ŝanĝiĝis de 65 al 75.

5. Eldonaĵoj: Stabiliĝis la eldonritmo de *Kontakto*. Nova varbkampanjo rezultis per aliaj abonoj, tamen sur tiu ĉi kampo multo estas ankoraŭ farenda.

TEJO tutmonde bone progresas. Sub la redakto de A. Künzli la bulteno jen kaj jen estiĝas monda forumo de junaj esperantistoj.

En 1985 en la serio *Esperanto-Dokumentoj* aperis "Historio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo" verkita de Norberto Saletti.

Komisiono pri Aktivula Trejnado eldonis la de longe atendatan, ĝisdatan broŝuron por Esperanto-aktivuloj *Kiel organizi IJK?*. La oficiala organo de la organizo, "TEJO-paĝo" en la revuo *Esperanto*, aperis sesfoje en 1985.

6. Servoj: La ĉefa servo estas Pasporta Servo de TEJO, kiu estas fama ankaŭ ekstermovade. La 12a listo de 1985 havas pli ol 600 adresojn el 53 landoj. Ne tiom sukcesis la labortendara katalogo, ĉefe pro tro malfrua finpreparo.

7. Kongresoj: Rekorda el la "okcidentaj" estis la 41a IJK en Eringerfeld (FR Germanio), de la 22a ĝis la 29a de julio 1985. Ĝi arigis 425 plentempajn partoprenantojn el 31 landoj. La kongreso estis ĉefa aktiveco de TEJO dum la IJJ. Dum la kongreso estis diskutita la temo "Junulo inter revo, ribelo kaj rezignacio".

Bone antaŭpreparĝas la organizado de la 42a IJK en Neurim (Israelo). Ĝi okazos inter la 14a kaj la 21a de aŭgusto 1986 kun la temo "Reviviĝo de lingvoj kaj de etnaj kulturoj".

La 43a IJK okazos en Krakovo (Pollando) de la 17a ĝis la 24a de julio 1987. Rilate la postajn kongresojn, estas esplorataj pluraj eblecoj.

8. Eksteraj rilatoj: Samkiel la plimulto de la agado de TEJO dum 1985, ankaŭ la eksteraj rilatoj evoluis sub la signo de la Internacia Junulara Jaro. Estas malbonŝance, ke ĝuste dum IJJ la organizo ne disponis pri plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo, ĉar G. Cansdale deĵoris tie nur de junio ĝis septembro. Tamen, TEJO aktive rolis aŭ reprezentiĝis en tuta aro da ekstermovadaj junularaj aranĝoj.

De la 1-a ĝis la 8a de julio okazis en Strasburgo Eŭropa Junulara Semajno, en kies preparlaboroj TEJO aktive rolis, kaj al kiu ĝi sendis du reprezentantojn, aldone al tiuj, kiujn siaflanke tien sendis ankaŭ kelkaj landaj sekcioj de TEJO. Al tiu aranĝo ligiĝis ankaŭ aparta kampanjo de TEJO por atentigi pri lingvaj malfacilaĵoj en internaciaj junularaj kunvenoj.

Fine de septembro, en Tuzsla (Jugoslavio), okazis, kvankam amasa, tamen kun malmultaj eksterlandaj partoprenantoj, seminario pri junularo kaj la kooperativa movado. La seminarion organizis jugoslavia landa sekcio kaj TEJO, kaj origine Eŭropa Junulara Fondaĵo konsentis subvencii ĝin. Malfeliĉe, pro eŭrope nereprezenta partoprenantaro, tiu subvencio fine estis rifuzita. Sed, komprenante la malfacilaĵojn de TEJO, la Fondaĵo konsentis revizii sian antaŭan decidon pri la subvencio al la pli frua seminario en Rimini (Italio).

Unu el la plej gravaj aranĝoj okaze de IJJ estis Unesko-kongreso pri junularo, okazinta en Barcelono inter la 8a kaj 15a de julio. TEJO tie reprezentiĝis pere de B. Despiney (UEA-estrarano pri eksteraj rilatoj) kaj E. Schwarzer (TEJO-estrarano pri eksteraj rilatoj), kiu estis invitita al la kongreso kiel eksperto. Al la plej amasa junulara aranĝo dum IJJ – Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Moskvo, meze de julio – TEJO sendis tripersonan delegacion (Vančurova, Schwarzer, Cansdale), sed ankaŭ en la landaj delegacioj troviĝis pluraj junaj esperantistoj. Estas notinde, ke pluraj informiloj kaj reklamiloj de la festivalo aperis ankaŭ en Esperanto.

Estas aparte menciinda Esperanto-kurso, sub gvido de S. MacGill, kiu okazis en la kadro de la seminario de la Eŭropaj Junaj Kristan-Demokratoj, inter la 6a kaj 12a de oktobro, en Eŭropa Junulara Centro, en Strasburgo. Ne nur, ke dudeko da kursanoj intense studis

Esperanton, sed ankaŭ pluraj aliaj dekoj da seminarianoj informiĝis pri la Internacia Lingvo, i.a. pere de alloga ekspozicio de unu el la filioj de UFE.

Kontaktoj kun Eŭropa Kunordiga Buroo en Bruselo fariĝis pli intensaj, tiel ke TEJO-estrarano A. Humet iĝis revizoro de EKB. Aparta delegacio de TEJO vizitis EJC en novembro, ĉefe por trakti eblecojn de nova TEJO-seminario en Strasburgo. Nun estas konsentite, ke tia seminario okazos fine de aŭgusto 1986.

9. Landa agado: En 1985 aperis raporto pri landa agado de TEJO. La dispartigo de la landa agado al du estraraj taskoj montriĝis misago pro misfunkcio de la eksestrarano N. Kovačić. De post la 41a IJK LA denove estas unu estrara fako, kaj sub gvido de d-ino M. Vančurova restabiliĝas. Nun pli da atento bezonas ekstereŭropaj landoj.

10. Aktivula trejnado: Komisiono pri Aktivula Trejando kunsidis trifoje tra la jaro: dum la 28a Internacia Seminario en Wetzlar, dum la TEJO/PSEK-seminario en Kazimierz Dolny, kaj dum la IJK en Eringerfeld. La gvidadon de KAT transprenis Jarek Parzyszek (Pollando). Daŭras laboroj pri ellaborado de bezonataj trejn-materialoj por E-o-aktivuloj. Per la broŝuro "Kiel organizi IJK?" lanĉiĝis eldonserio "Broŝuroj por Esperanto-aktivuloj". Sub la instigo de KAT pluraj LSj kaj aliaj kunlaborantaj organizoj entreprenis preparadon de lokaj trejnaj kursoj. En 1985 aperis raporto kompilita de Jan Koszmaluk pri "Stato de edukado/trejnado de junaj E-aktivuloj".

11. Scienca kaj faka agadoj: La ĉi-kampa agado okazis ĉefe en la mediprotekta sfero. Funkcias tiurilata Koresponda Komisiono, kies gvidanto estas R. Baross. La mediprotekta agado survojas al la fondo de faka asocio. La nomo de ĝi estos Naturprotektada E-Organizo. En la medio de la esperantistoj, studentoj pri juro kaj junaj juristoj lanĉiĝis preparlaboroj al la pli bona informfluo kaj jura kunlaboro helpe de E-o. La komisiono lanĉis kunlaboron kun la fakaj asocioj de UEA, kun la celo starigi plurajn fakajn sekciojn de TEJO.

12. Kultura agado: Kreskantaj aktivecoj inter la membroj de TEJO kreis bazon por kunordigi kaj instigi la tuton al la pli bona kultura nivelo. Tiel Norberto Saletti debutis en la nova estrara fako. En pluraj landoj okazas kulturaj aktivecoj organizataj de gejunuloj.

13. Jubilea agado: Dum la 41a IJK la Komitato instigis la estraron starigi komisionon pri la Jubilea Jaro. Laborojn de la komisiono gvidas la prezidanto, Ian Jackson. La komisiono kreas la junularan programon rilate la Jubilean Jaron.

14. Patronoj de TEJO: Ĉi tiu mecenata kategorio de apogantoj de TEJO altiris nur dekon da homoj pli ol en la antaŭa jaro. En la estraro de TEJO oni rekonceptas la kategorion kaj volas krei el ĝi ian TEJO-version de Societo Zamenhof.

12. LANDA KAJ REGIONA AGADO

1. Aliĝintaj landaj asocioj: Pluraj landaj asocioj rikoltis admirindajn sukcesojn en sia agado dum 1985. Sendube, pleje elstaras la laboro en Francio, pro kio Unuiĝo Franca por Esperanto gajnis en 1985 la Trofeon Fyne, kiu iras al la plej bona landa asocio de UEA. Bonajn rezultojn notis ankaŭ Germana Esperanto-Asocio, kiu i.a. eldonis du belajn librojn kaj kies aktivuloj organizis la du plej grandajn E-kongresojn (UK en Aŭgsburgo, IJK en Eringerfeld). Ĉina Esperanto-Ligo koncentris siajn fortojn je la preparo de la 71a UK, sed ne malatentis vastskalan korespondan kaj kursan instruadon de Esperanto. Por la kvina fojo en sinsekvaj jaroj ĈEL organizis 10-monatan E-kurson por dudeko da universitataj lingvoinstruistoj, kiuj studis Esperanton en Ŝanhajo, por poste mem lekcii pri ĝi en la altlernejaj institucioj tra la tuta lando. Ankaŭ la evoluoj en Brazilo estis kuraĝigaj dum 1985, ĉar tiulanda E-movado survojas al organiza unueco sen malhelpi lokan kaj regionan iniciatemon pri E-agado. En la orienta Eŭropo la agado viglis kiel dum pluraj lastaj jaroj, kun escepto de Pollando, kie la agado por Esperanto grave suferis fine de 1985 pro kvereloj interne de Pola Esperanto-Asocio. Tio kondukis al perforta ŝanĝo de la estraro de PEA kaj al eksiĝo de LKK por la venontjara Kongreso en Varsovio. Kiel ajn kelkaj movadaj periodaĵoj, pro neinformiteco aŭ partieco, provas prezenti tiujn polajn problemojn kiel politikajn – ne temas pri tio. Pola Esperanto-Asocio jam de jardekoj suferas de iaj krizoj, kaj nun simple venis vico al la plej nova. Feliĉe la agado en tiu lando daŭre okazas ofte kun granda materia kaj morala subteno de la sociaj instancoj. Tion multaj el ni konstatos en 1987, okaze de la 72a UK en Varsovio.

2. Nealiĝintaj organizaĵoj: Malmultaj novaĵoj ĉirilate. Nenio nova pri Soveta Unio, kies Asocio de Sovetiaj Esperantistoj ankoraŭ restas ekster UEA. Ankaŭ la irana situacio ne pliboniĝis, kvankam la agado tie daŭre konservas sian admirindan viglon. Ekzistas pluraj indicoj, ke la Esperanto-agado en Rumanio fariĝas ĉiam pli malfacila, kvankam en tiu lando neniam kreiĝis adekvata movada strukturo post la Dua Mondmilito. UEA provis kaj provas interveni pri la absurda pozicio de Esperanto en tiu lando.

3. Regiona agado: Tre bone evoluas la agado en Afriko. En pluraj landoj (Benino, Ebura Bordo, Kongo, Togolando, Zairio) jam ekzistas ĝermoj de memstara loka E-movado. En aliaj landoj ankoraŭ restas plena dependeco de ekstera instruhelpo (Alĝerio, Gambio, Gano, Kamerunio, Kenjo, Nigerio, Tanzanio). Madagaskaro ankoraŭ restas unika kazo en Afriko: sufiĉe amasa kaj bonkvalita E-movado, kiu ne sukcesas efike organiziĝi. Evidente, restas landoj en Afriko, en kiuj ankoraŭ ne ekĝermis E-agado. Kvankam la disvastigo de Esperanto en tiu

kontinento postulos ankoraŭ multajn jarojn (kaj jardekojn), UEA certe daŭrigos tiun agadon, des pli ke multaj ĝiaj membroj malavare donacas al la Fondaĵo Azio-Afriko, kiu financas la laborojn sur ĉi tiu kampo. Feliĉe, ne mankas ankaŭ vasta kunlabor-preteco de la Esperanto-movado ĝenerale. Des pli ridinde sonas kelkaj izolaj (kiel ajn laŭtaj) kontraŭvoĉoj ĉi-rilate. La ĉefan atenton en Afriko nun postulas nek varbado (tiu okazas foje eĉ tro prospere) nek koresponda instruado (bonvenus surlokaj kursoj), sed la utiligo de Esperanto fare de tiuj, kiuj jam lernis la lingvon. Bonvenus ankaŭ tia utiligo, kian oni spertas en aliaj kontinentoj. Sed en Afriko okazas neniaj E-aranĝoj. Des pli gravas la klopodoj organizi Universalan Kongreson en unu el la afrikaj landoj post kelkaj jaroj. Iom da klopodoj daŭras en kelkaj aziaj landoj (Turkio, Jordanio, Saŭda Arabio, Mongolio, Nepalo), sed ili estas malmultaj kompare kun la intensa laboro en Afriko.

13. FAKA AGADO

1. Scienca Eldona Centro (SEC): Post sia plurjara ekzisto (fondita en 1981), SEC en Budapeŝto devis esti malfondita en 1985. Ekde la 1-a de aŭgusto 1985, SEC ne plu havas salajratajn kunlaborantojn en Budapeŝto. Tian evoluon kaŭzis pluraj faktoroj, el kiuj pleje gravas la jenaj: 1) La siatempe ellaborita dokumento pri la eldona politiko de SEC estis neniam serioze atentata en la praktiko, tiel ke aperis pluraj malgravaj kaj por la merkato neinteresaj verkoj. 2) Dum sia kelkjara ekzisto SEC mastrumis pri disponigita aŭ memkreita kapitalo de kelkaj milionoj da forintoj, sed ĝi ne sukcesis utiligi tiun grandan komencan investon por generi novajn rimedojn por plua investado. 3) Malgraŭ multaj laŭtaj asertoj, ke la movada libromerkato soife atendas fakajn librojn, la realo montriĝas alia: kun escepto de la verkoj *Ĉu vi konas la Teron?* kaj *Amuza matematiko*, la eldonaĵoj de SEC tre malbone vendiĝas, tiel en Budapeŝto kiel en Roterdamo.

***Du lastatempaj sciencaj eldonaĵoj de UEA:* Perkomputila tekstoprilaboro *kaj* Sciencaj komunikaĵoj.**

En la jaro 1985 tamen aperis pluraj titoloj sub la marko de SEC. La plej grava el ili estas *Perkomputila tekstoprilaboro* (336 p), kies vendoritmo estas tre malkuraĝiga. Aperis ankaŭ pluraj teknike tre altnivelaj kajeroj de *Sciencaj komunikaĵoj*, sed la interesiĝo de la publiko restas tute magra. Feliĉe, ilian eldonkoston plejparte kovris la diversaj reklamtekstoj.

Kvankam la oficejo de SEC en Budapeŝto fermiĝis kaj la spertoj de UEA kun la budapeŝta eksperimento ne estas malamaraj, klopodoj plueldoni fakajn kaj popularsciencajn verkojn restas unu el la prioritataj taskoj de UEA. Tial jam meze de 1986 aperos la bela volumo *Vetero kaj klimato de la mondo*, kiun eldonas UEA (SEC en Roterdamo) kunlabore kun la Universitato de Kembriĝo en Britio.

2. Aplikado de Esperanto: Terminologia Esperanto-Centro nun firme stabiliĝis sub gvido de s-ino Wera Dehler (GDR) kaj kun helpo de la speciale starigita Fondaĵo Wüster, kiun administras UEA. La celo de la centro estas kunordigi agadon sur la terminologia kampo kaj normigi terminojn en la diversaj fakoj – laboro tre necesa por sukcesigi la enkondukon de Esperanto en la sciencon.

La nederlanda firmo BSO daŭrigas sian projekton DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado), kiu celas utiligi maŝinkonforman varianton de Esperanto kiel pontolingvon por la permaŝina tradukado. La projekton subtenas la nederlanda registaro. Dum la jaro BSO dungis pliajn esperantologojn por pliampleksigi la laboron, kaj pliaj dungoj estas antaŭvidataj. UEA kunlaboras per aparta kontrakto, precipe pri terminologio kaj esperantologiaj demandoj. La projekto de BSO estas nun la plej granda inter multaj komputilaj laboroj nuntempe en progreso ekster la kadro de UEA. Aperis en 1985 la unua numero de la revuo *Aktuala Komputiko* kaj en Hungario denove okazis sukcesa internacia konferenco Interkibernetik.

La 12an kaj 13an de septembro en San-Marino oficiale registriĝis Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kies celo estas starigi internacian universitatan strukturon en tiu lando per utiligo de Esperanto. Sekvis en oktobro kadra leĝo de la sanmarina parlamento por ebligi starigon de diplomoj, universitataj titoloj ktp. Fine de la jaro oni organizis Universitatan Sesion kun pli ol 80 partoprenantoj kaj okazis la unuaj ekzamenoj de kandidatoj. Estis instalita senato de AIS sub prezido de prof. Helmar Frank (FR Germanio).

3. Fakaj asocioj: Filozofia Asocio Tutmonda (FAT), kunlaboranta faka asocio de UEA de post la UK en Aŭgsburgo, celas krei filozofian literaturon en Esperanto kaj jam aperigis tri originalajn verkojn. Ĝi daŭrigas tiun laboron kaj okupiĝas ankaŭ pri tradukoj de klasikaj verkoj. Akceptita en la sama sesio de la Komitato de UEA kiel kunlaboranta faka asocio neneŭtrala, Esperanto-Propaganda Asocio de

Oomoto grave kontribuis finance kaj fizike al organizado de la Tago de la Paco kadre de la UK.

En septembro ILEF organizis la Unuan Internacian Esperantan Kino-Foto-Festivalon en Pisanica, Bulgario, kun 60 reprezentantoj el pluraj landoj. UEA komisiis ILEF-anojn Dončo Hitrov, Roman Dobrzyński kaj Ulrich Lins produkti koloran filmon pri la centjariĝo de Esperanto. UMEA (medicinistoj) organizis la tradician Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon en Schwerin, Germana DR, kun granda sukceso. Ĉe la konferenco de ILEI (instruistoj) en Svedio okazis elekto de nova estraro sub gvido de prof. I. Szerdahelyi, kiu tuj komencis intensan agadon kaj vekis grandan interesiĝon inter siaj membroj. La estraro de ILEI okazigis komunan estrarkunsidon kun UEA, kaj la du organizaĵoj interkonsentis pri pli proksima kunlaboro. ILEI okazigas sian venontan konferencon en Loveno, Belgio, en julio.

Ne eblas mencii ĉiujn interesajn iniciatojn de la diversaj fakaj organizaĵoj. Kelkaj (ekzemple la aŭtistoj) planas eldoni terminaron; aliaj laboras por sukcesigi Esperanton ĉe la instancoj (ekzemple la poŝtistoj, kiuj kampanjas por eldono de Esperanto-poŝtmarkoj okaze de la Jubilea Jaro); aliaj kunlaboras kun UEA en diversaj iniciatoj (ekzemple brajligo de la programo de la UK kaj enkasetigo de la kongresa libro: rezulto de kunlaboro kun la blindula organizo LIBE).

Ene de UEA, la Komisiono pri Virina Agado daŭrigas sian programon, ekzemple per reprezentiĝo en la Internacia Virina Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj en Najrobo kaj aperigo de plurlingva faldfolio por utiligo de konferencanoj.

14. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Oni povas prave aserti, ke neniam antaŭe la laboro de CED, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, estis tiel intensa kiel nun. La Centro, kies direktoro estas d-ro Humphrey Tonkin, havas sian apartan estraron, nomatan de la Komitato de UEA, kiu lastatempe decidis aldoni al la estraro ankaŭ s-ron E. Symoens (Belgio), kiu okupiĝas pri kompilado de bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj pri reprezentigo de CED en fakaj konferencoj. Daŭre aperas ĉe Akademia Centro Interlingvistika (Pollando), sub redakto de s-ro Ryszard Rokicki, la bulteno de CED *Informilo por interlingvistoj*, kiu estas senpage ricevebla de fakuloj, kiuj turnu sin per tiurilata peto al la CO de UEA. La Informilo liveras utilajn scigojn pri novaj esperantologiaj kaj interlingvistikaj verkoj, konferencoj, esploroj ktp. Ĝi aperas en Esperanto.

La scienca revuo *Language Problems and Language Planning* (Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado, *LPLP*), la ĉefa organo de CED, daŭre aperadas ĉe University of Texas Press (Usono). Pro transigo de la redakcio el Sauda Arabio al Usono, okazis fine de 1984 kaj komence de 1985 diversaj prokrastoj, sed la nova administra redaktoro, d-ro Tonkin, nun preskaŭ forigis tiujn malfruiĝojn. La unua jarkolekto sub lia redakto montris rimarkindan kreskon de utiligo de Esperantaj tekstoj (du plenaj artikoloj kaj pluraj novaĵeroj) kaj tekstoj en diversaj aliaj lingvoj, aldone al la angla. Resumoj de ĉiuj ĉefaj artikoloj aperas en Esperanto. Vicredaktas prof. Frank Nuessel kaj helpas en la redaktado d-rino Karen Johnson-Weiner. Sub la nova redaktoro ekvilibriĝis la spezoj ĉe la revuo kaj komencis kreski la nombro de abonantoj.

Dum la Informilo servas al la internaj bezonoj de la movado, la revuo *LPLP* celas ĉefe la eksteran publikon: ĝi helpas konstrui la sciencan bazon por studi kaj esplori lingvajn problemojn. Se oni ne rekonas la ekziston de lingvaj problemoj, aŭ supozas ilin jam solvitaj, oni ne povas veni al la konkludo, ke Esperanto povus ludi signifan rolon en la internaciaj rilatoj de la estonteco. *LPLP* estas do unu el la eksteraj voĉoj de la Esperanto-movado. Ĝi samtempe liveras al niaj fakuloj utiligeblajn argumentojn kaj donitaĵojn. Similan taktikon oni sekvas en CED koncerne konferencojn kaj seminariojn: ĉiujare CED organizas internan konferencon por esperantologoj dum la UK kaj ĉiujare ĝi organizas eksteran konferencon pri iu socilingvistika temo precipe por eksterstarantoj, lige kun la agado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

La 8a Esperantologia Konferenco, do la interna konferenco, okazis dum la UK en Aŭgsburgo. Ses prelegantoj alparolis grandan publikon pri plej diversaj temoj ligitaj al la rilato inter konservemo kaj ŝanĝemo en la lingvo Esperanto – temo do ligita al tiu de la UK mem, kiu traktis la rilaton inter antikvo kaj moderno. Raporto pri la konferenco estas trovebla en la septembra numero de la revuo *Esperanto* (pĝ.149). La konferenco kompreneble okazis en Esperanto.

La kvara Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado okazis en Novjorko la 13an kaj 14an de decembro en tre ambicia formo. Gi havis du temojn: "Superi la lingvobaron: La homa/maŝina rilato" kaj "La ideo de universala lingvo" – ĉi-lasta ligita al la Jubileo de Esperanto. La konferenco estis komuna aranĝo de CED kaj de la Traduka Fako de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝi okazis sub prezido de s-ino Françoise Cestac, la Direktoro de la Traduka Fako, en la unua tago, kaj de s-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, en la dua tago. Sepdeko da fakuloj ĉeestis, el UN kaj el universitatoj kaj esploraj institutoj. Raporto aperis en la februara (1986) numero de *Esperanto* (p.23). CED aperigis dum la jaro plenan raporton 150-paĝan pri la tria Konferenco, kaj estas en preparo tiu de la kvara. En 1986 oni antaŭvidas du konferencojn, ambaŭ komune aranĝitajn de CED kaj de la Traduka Fako de UN: la 5a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado okazos en decembro, kaj jam en oktobro okazos Seminario pri Lingvo en Religio, ĉe Kolegio Mercy,

apud Novjorko. CED aŭspicios kaj kunorganizos ankaŭ (kun Japana Esperanto-Instituto) la Internacian Simpozion honore al la Centjara Jubileo de Esperanto, kiu okazos en Tokio en aŭgusto kun la temo "Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo."

Elstara aranĝo, ligita al la laboro de CED, estis la Kunveno de Specialistoj pri Plurlingveco kaj Komunikado ĉe Unesko en novembro. Ekster la kadro de CED, menciindas la apero en 1985 de pluraj gravaj esperantologiaj libroj, la aktiva agado de CDELI en La Chaux-de-Fonds (Svislando), la daŭra apero de granda interlingvistika kaj esperantologia bibliografio en la Jara Bibliografio de la Asocio pri Modernaj Lingvoj (Usono) kaj la ĉiam pli efika agado de la nova Terminologia Centro de UEA sub gvido de s-ino Wera Dehler.

Estas evidente, ke la "sanstato" de esplorado kaj dokumentado pri Esperanto kaj pri lingvaj problemoj estas nuntempe elstare bona – dank' al la agado de CED, de Akademio de Esperanto kaj de amaseto da unuopaj kunlaborantoj, institucioj, eldonejoj kaj organizaĵoj. Oni prave fieru pri la progreso en la pasintaj kelkaj jaroj.

15. FINAJ VORTOJ

La dek kvar ĉapitroj, kiuj antaŭas tiun ĉi faras tiun kutiman provon en deko da tekstopaĝoj resumi tutan jaron da vivo kaj agado de la plej granda internacia Esperanto-organizaĵo. Tiu resumklopodo ĉi-jare versajne ne montriĝos pli kompleta aŭ pli sukcesa ol ĉe la antaŭaj provoj fari tion. Tamen, por atenta leganto, por bonvola sekvanto de la vivo de UEA ĉi tiu Estrara Raporto li veras sufiĉe da faktoj kaj iom da analizoj pri la asocia aktiveco dum la jaro 1985. El tiuj faktoj kaj analizoj eblas fari konkludojn, utilajn por la plua prospero de UEA.

Ni ne dubas, ke denove troviĝos iom da membroj (eĉ iom da komitatanoj), kiuj fiksiĝos al la fakto, ke la asocia spezokonto por 1985 saldiĝis negative kaj kiuj utiligos tiun fakton por alarmi kaj profeti pri "nigra" estonteco. Ekzistas nenia bazo por tiaj pensoj, kvankam estas tute on ordo daŭre prudenti sur la financa kampo. La financoj de UEA estas nun en pli bona stato ol iam ajn antaŭe en la historio de UEA. Jes, ni elspezas multe, sed ni ankaŭ enspezas pli multe. Ŝajnas, ke la ordinaraj membroj kelkfoje komprenas tion pli bone ol iuj komitatanoj aŭ aliaj movadaj funkciuloj. Tial la fido al UEA kreskas, tial la membronombro de la Asocio kreskas, tial en la unuaj monatoj de 1986, kiam oni finredaktadis ĉi tiun Raporton, UEA ricevis diversajn heredaĵojn en la sumo de kvinona miliono da guldenoj (kaj tiom aŭ malpli iam sumis ĉiuj havaĵoj de la Asocio).

Ni ĉiuj aspiris, ke UEA frontu la Centjaran Jubileon en 1987 kiel eble plej forta kaj potenca sur ĉiuj kampoj kaj en ĉiuj aspektoj. Ŝajnas nun, ke ja restas ekster dubo, ke la Asocio efektive estas pli forta kaj bonstata ol ĝi iam ajn estis. Ni konstatu tion ne por haltigi tiujn aspirojn, sed por intensigi ilin sojle de la dua jarcento de la Internacia Lingvo.

REVIZORA RAPORTO

Kontrolante la enskribojn de la Bilanco de 31 decembro 1985 kaj la Spezokonton de 1985, mi konstatis, ke la librotenado estas en bona ordo. Al ĉiuj demandoj oni kontentige respondis.

Mi ankaŭ konstatis, ke la ĝenerala politiko de UEA ne pliboniĝas, ĉar oni per kompensoj el kapitalaj kontoj kaŝas la veran deficiton de la Spezokonto. Tiu ĉi montras negativan saldon de 93 575 gld., sed ĝi estas la rezulto nur post enkonduko de sumoj de entute 58 336 gld., kiel kompensoj, kiujn oni devos deskribi en la venontaj jaroj. Krome, oni ne adaptis (t.e. ne altigis) la rezervon por dubindaj debitoroj (nun 120 209,75 gld.), por preni en konsideron la nunan situacion, en kiu 146 749,90 gld. estas juĝeblaj kiel dubindaj.

La ĝenerala financa situacio de la Asocio estas videbla en la ĉi-suba superrigardo de la likideco:

Bilanco de likideco je la 31 dec. 1985

Fiksitaj havaĵoj	790 723	Propra kapitalo	678 278
Enkasigeblaj havaĵoj	772 140	Longedaŭraj kreditoroj (> 1 jaro)	643 082
Likidaj rimedoj	849 499	Mallongedaŭraj kreditoroj (< 1 jaro)	1 091 002
	2 412 362		2 412 362

Oni nun jam financas la fiksitajn havaĵojn per la mono de la longedaŭraj kreditoroj, al kiuj oni grandparte pagas 6% da rento. Krome, la propra kapitalo ankoraŭ ne inkluzivas la aldonajn perdojn pro dubindaj debitoroj, nevendeblaĵoj en la librostoko, amortizadon de la kapitaligitaj kompensoj kaj deskribotaj transprenkostoj en la GCA-kontaro.

L. Hordijk

REVIZORA DEKLARO

La subskribintoj, komitataj revizoroj, kontrolis okaze de diversaj vizitoj al la Centra Oficejo en marto kaj aprilo 1986 la kontadon de UEA pri la administra jaro 1985.

Ni bazis nian laboron sur la jenaj dokumentoj:

– spezoj de UEA de 1985,

– bilanco de UEA je la 31a de decembro 1985 kaj

– evoluo de fondaĵoj kaj kapitalaj kontoj en 1985.

Ni konstatis, ke la menciitaj dokumentoj prezentas fidindan bildon de la grandeco kaj konsisto de la havaĵoj kaj fondaĵoj de la Asocio je la 31a de decembro.

Krom ĉi tiu konciza revizora raporto, ni faris ankaŭ pli ampleksan informraporton, kiu ne havas

revizoran valoron, sed kiu pli profunde traktas la financan strukturon de UEA, GCA kaj la fondaĵoj, kaj la funkciadon de KFA.

Tamen ni volas fari ankaŭ ĉi tiun jaron kelkajn rimarkojn.

Du gravaj pasintjaraj plendoj de la profesia revizoro restas validaj, sed ne plenumitaj:

– prefere oni ne rigardu donacojn kiel negativajn kostojn, sed kiel ekstrajn amortizojn,

– kompensoj estas nur manipulado en kaŝita formo.

Debitoroj: estas granda grupo da debitoroj, inter kiuj kelkaj estas sufiĉe grandaj, kiuj ne nur jam ekzistas dum pluraj jaroj, sed al kiuj ankaŭ ne estas kalkulita rento. La tuta sistemo de rentokalkulo lamas kaj tio kostas amason da mono. UEA entute havas 26 debitorojn, kiuj ŝuldas po pli ol mil nederlandajn guldenojn, inter ili 20 Esperanto-asocioj aŭ institutoj. La ŝuldo de tiu grupo sumiĝas je 270 505,95 gld. Jaŭ du jarojn ni plendas, ke UEA nenion faras por redukti tiun sumon. Efektive la sumo nur kreskas. Tio jes signifas, ke 15% de la tuta asocia kapitalo estas morta kapitalo. Ni forte proponas, ke UEA taskigu iun, kiu regule faros debitorkontrolon.

Deficito: ankaŭ 1985 portis al ni grandan deficiton. Financaj evoluoj ne estas tiel rapide ŝanĝeblaj, tamen la situacio iom ŝanĝiĝis. Ne nur estas paroloj pri ŝparoj, estas ankaŭ agoj. La Centra Oficejo volenevole ŝparas, pro la redukto de la nombro de homoj, kiuj nun laboras tie. Tio bedaŭrinde havas ankaŭ malbonan flankon: troŝarĝon de la restantaj oficistoj. Tio ankaŭ malfaciligas la aliron de novaj, profitdonaj kampoj, kiuj estas tiel bezonataj por pli bone povi financi kaj evoluigi nian asocion. Tiu troŝarĝiĝo ankaŭ pensigu plurfoje la nov-elektotan estraron, antaŭ ol ĝi elpensu refoje amason da novaj ideoj. Estraranoj estu konsciaj pri la fakto, ke ĉiu nova tasko devas esti farita de tiuj troŝarĝataj oficistoj, kaj ke por ĉiu nova ideo ĝenerale estas bezonata ankaŭ mono.

Malmultaj homoj interesiĝas pri financoj, sed financoj bedaŭrinde jes formas la bazon de ĉiu laboro farinda. Jam nur pro tio, ni restu atentaj pri la sano de la financa bazo.

Fred de Geus kaj Bob Venhuizen

FINANCAJ ALDONAĴOJ AL LA RAPORTO

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj)

Spezokonto
de Universala Esperanto-Asocio
por la jaro 1985

KOSTOJ	**Buĝeto**	**Rezulto**
Salajroj, malnete	341 000	289 436,82
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	76 000	59 012,35
Volontula servo	2 500	4 259,15
Senimpostaj suplementoj	10 200	10 206,70
Trinkaĵoj	1 500	1 461,05
Kompensoj pro malsano	0	– 5 078,06
Salajroj ktp., nete	**431 200**	**359 298,01**
Afranko nete	19 300	17 596,83
Telefono, telegrafo	9 900	8 930,10
Presaĵoj	11 000	7 331,82
Materialoj	9 000	6 097,28
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj ..	13 800	8 923,59
Revizoro	1 450	1 450,00
Administraj kostoj ĝeneralaj .	10 000	3 529,17
Fotokopiado	5 500	3 475,73
Fotokopiado (vendoj/kompensoj)	– 1 800	– 1 552,71
Centra Oficejo, nete	**78 150**	**55 781,81**
Gaso, elektro	13 000	11 639,74
Akvo	500	772,19
Riparo de la Domo	2 000	4 748,56
Purigado kaj purigiloj	1 100	1 171,83
Asekuroj	2 500	1 690,01
Impostoj je la Domo	2 800	3 324,75
Luoj ricevitaj	– 1 000	– 450,00
Oficeja Domo, nete	**20 900**	**22 897,08**
Preskostoj de *Esperanto*	43 400	39 320,00
Sendokostoj	47 000	50 585,71
Ekspedlaboro	19 000	13 829,96
Grafiko	34 000	21 437,63
Kovertoj	3 100	3 320,00
Anoncoj	– 18 000	– 12 009,50
***Esperanto*, nete .....**	**128 500**	**116 483,80**
Preskostoj de la Jarlibro	23 000	21 300,00
Sendokostoj	13 000	12 906,44
Ekspedlaboro	750	186,94
Grafiko	8 700	10 237,42
Kovertoj	1 500	973,46
Anoncoj	– 12 000	– 13 680,26
Jarlibro, nete	**34 950**	**31 924,00**
Preskostoj de *Kontakto*	12 800	8 933,68
Sendokostoj	5 250	8 081,95
Ekspedhelpo	3 000	2 758,06
Grafiko	13 000	9 454,51
Kovertoj	450	321,92
Redakto	4 200	3 000 00
Anoncoj	– 3 000	– 329,60
***Kontakto*, nete .....**	**35 700**	**32 220,52**

Vojaĝkostoj Estraro de UEA	22 000	28 379,44
Vojaĝkostoj komisionaj ktp. ..	2 200	2 424,63
Vojaĝkostoj oficejaj	4 000	7 117,00
Vojaĝkostoj Estraro de TEJO ...	2 300	2 963,95
Vojaĝkostoj kongresaj	11 000	11 692,02
Reprezentaj kostoj	2 700	4 385,64
Vojaĝkostoj ktp.	**44 200**	**56 962,68**
Korespondado Estraro de UEA .	8 500	6 205,52
Korespondado Komisiitoj ktp. ..	2 200	385,99
Korespondado Estraro de TEJO	2 200	1 455,77
Korespondkostoj, entute	**12 900**	**8 047,28**
Bankokostoj	3 600	3 282,89
Kurzodiferencoj	0	2 218,67
Antaŭa jaro	0	74,00
Belartaj Konkursoj	2 400	3 048,22
Diversaj kostoj	1 300	49,91
Ĝeneralaj kostoj	**7 300**	**8 673,69**
Amortizo de la Domo: 1%	3 000	4 005,84
Amortizo de inventaro (CO) 20%	4 000	8 173,47
Amortizo de fotokompostilo: 20%	0	5 500,00
Amortizo de komputilo: 20%	10 000	15 079,90
Amortizo de la programoj k.a: 20%	20 000	13 427,08
Amortizoj, entute	**37 000**	**46 186,29**
Sumo de la kostoj	**830 800**	**738 475,16**

RIMEDOJ (enspezoj)	**Buĝeto**	**Rezulto**
Kotizoj Membro-Jarlibro	27 000	29 868,48
Kotizoj Membro-Abonanto ...	235 500	222 531,24
Kotizoj MJ-Kontakto	4 000	4 339,90
Kotizoj MA-Kontakto	10 500	12 225,58
Kotizoj, individuaj membroj ..	277 000	268 965,20
Aligitaj membroj UEA	18 800	24 279,79
Aligitaj membroj TEJO	6 400	8 670,59
Simplaj abonoj de *Esperanto*	10 000	9 094,19
Kolektivaj abonoj *Esperanto*	7 500	10 167,93
Abonoj kaj vendoj *Kontakto*	12 900	8 946,60
Kolektivaj abonoj *Kontakto*	2 300	4 942,57
Societo Zamenhof	29 000	21 078,52
Kotizoj de fakaj organizaĵoj ..	2 900	2 967,42
Kotizoj, entute	**366 800**	**359 112,81**
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	**7 000**	**12 809,87**
Vendoj de la Libroservo	237 000	284 117,52
Aĉetoj (minus ŝanĝo stokvalora)	– 148 000	– 178 312,93
Libroservo, malnete	89 000	105 804,59
Tantiemoj	– 7 000	– 5 093,22
Katalogokostoj (kontribuo) ...	– 13 000	– 12 000,00
Libroservo, nete	**69 000**	**88 711,37**
Abonservo, nete	6 000	8 627,00
Grafikaj servoj de CO, nete ..	18 000	11 141,40
Aliaj servoj de CO	15 000	4 492,83
Diversaj servoj, entute	**39 000**	**24 261,23**
de Inventaro pro programado ...	30 000	14 000,00
de Kapitalo Dumvivaj Membroj	33 000	28 564,00
de TEJO/KER pro volontuloj ...	8 000	0,00
de Inst. Hodler pro administrado ..	0	2 400,00
de Propaganda Konto pro informado	0	5 000,00
de domokonto pro konstruado ..	25 000	30 000,00
de Jubilea Fondaĵo pro laboro ...	12 000	12 000,00
Kompensoj, entute	**108 000**	**91 964,00**
Antverpena oficejo, nete	**70 000**	**– 50 033,33**
Kotizoprocentaĵo 70a UK	95 000	88 482,82
50% de licencpago 41a IJK	4 000	2 000,00
Kongresoj, entute	**99 000**	**90 482,82**
Turismaj aranĝoj	**15 000**	**0,00**
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj ...	**5 000**	**598,00**
Rento ricevita	62 000	49 910,28
Rento pagita	– 10 000	– 22 917,63
Rento, nete	**52 000**	**26 992,65**
Sumo de la rimedoj	**830 800**	**644 899,42**
Negativa saldo	**0**	**93 575,74**
Sumo de la kostoj	**830 800**	**738 475,16**

Bilanco

de Universala Esperanto-Asocio je la 31a de decembro 1985

(por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1984)

AKTIVOJ	**1984**	**1985**
Kasoj diversaj	1 990,76	3 579,41
Bankoj, pĉk., kur. kontoj	34 639,35	137 477,54
Ŝparkontoj kaj deponoj	126 976,08	113 305,57
Nekonverteblaj monrimedoj ..	8 517,26	8 550,58
Monrimedoj likidaj	**172 123,45**	**262 913,10**
Akcioj	211 255,00	237 036,00
Obligacioj	390 566,40	344 421,48
Valorpaperoj entute	**601 821,40**	**581 457,48**
Ricevotaj rimedoj	49 298,90	41 519,08
Antaŭpagitaj kostoj	24 375,99	34 682,74
Debitoroj	402 432,04	385 552,01
Institucio Hodler '68	156 352,96	160 830,10
Garantiaj sumoj	6 930,00	6 930,00
Debitoroj ktp. entute	**639 389,89**	**629 513,93**
Provizoj libroservaj	291 640,16	352 859,35
Provizoj librokatalogo	21 595,05	12 128,82
Presaĵoj, materialoj k.s.	25 674,00	13 785,41
Provizoj entute	**338 909,21**	**378 773,58**
Maŝinoj ktp. Roterdamo	10 222,48	54 693,87
Komputilaro Roterdamo	73 543,94	60 319,61
Programaro Roterdamo	52 831,96	53 708,30
Maŝinoj ktp. Roterdamo	**136 598,38**	**168 721,78**
Bilanca valoro Antverpeno	**154 213,15**	**140 622,31**
Bilanca valoro Novjorko	**9 934,63**	**15 137,33**
Domo de UEA, Roterdamo ..	222 760,86	355 432,00
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Nemoveblaĵoj	**222 761,86**	**355 433,00**
Sumo de la aktivoj	**2 275 751,97**	**2 532 572,51**

PASIVOJ	**1984**	**1985**
Antaŭricevitaj rimedoj	74 776,97	87 119,94
Pagotaj kostoj	120 148,74	154 552,61
Pendantaj spezoj	6 765,73	9 128,18
	201 691,44	**250 800,73**
Kreditoroj	653 046,45	840 201,68
Ŝparkontoj de membroj	335 416,82	437 856,27
Kreditoroj entute	**988 463,27**	**1 278 057,95**
Rezervo por debitoroj	111 699,57	120 209,75
Kongresa Rez. Fondaĵo	51 840,70	54 175,66
Rezerva Fondaĵo IJK	1 292,19	1 292,19
Rezervo CO-oficistoj	40 000,00	40 000,00
Rezervita por telekso	0	3 853,45
Rezervoj entute	**204 832,46**	**219 531,05**
Eldona Fondaĵo	7 185,22	7 185,22
Fondaĵo Azio-Afriko	—	5 336,58
Fondaĵo Canuto	5 785,67	3 570,73
Fondaĵo Enciklopedio	1 899,47	1 899,47
Fondaĵo Grabowski	60 407,80	55 086,16
Fondaĵo Jubilea Jaro	7 863,70	11 444,43
Fondaĵo Kantoj	13 217,65	13 217,65
Fondaĵo TEJO	8 615,80	—
Fondaĵo TEJO (KER)	25 837,69	7 230,69
Fondaĵo Universala Ekspozicio	25 000,00	25 000,00
Fondaĵo Wüster	15 281,48	17 436,73
Propaganda Konto	51 339,94	17 817,76
Fondaĵoj entute	**222 434,42**	**165 225,42**
Kapitalo Dumvivaj Membroj ..	423 245,74	422 646,47
Cetera kapitalo	350 476,83	289 886,63
Saldo de spezokonto	–115 392,19	– 93 575,74
Asocia kapitalo entute	**658 330,38**	**618 957,36**
Sumo de la pasivoj	**2 275 751,97**	**2 532 572,51**

Evoluo de fondaĵoj
de UEA dum 1985

Eldona Fondaĵo		7 185
Fondaĵo Azio-Afriko:		
Donacoj ĝeneralaj		27 802
Donaco speciala (Cipro)		3 500
Kostoj dum 1985		– 25 965
Jarfine		5 337
Fondaĵo Canuto jarkomence		5 786
Donacoj kaj subvencioj		11 123
Kotizoj pagitaj		– 13 338
Jarfine		3 571
Fondaĵo CED:		
Donacoj, subvencioj ktp		9 878
LPLP (favora jarsaldo)		1 058
Esperanto-dokumentoj, ktp. nete		– 9 079
Informilo por interlingvistiko		– 1 857
Jarfine		0
Fondaĵo Enciklopedio		1 899
Fondaĵo Grabowski jarkomence ...	us$ 17 019	60 408
Donacoj kaj rento ricevitaj	us$ 5 381	
Premioj kaj kostoj	– us$ 2 513	
Jarfine	us$ 19 887	55 086
Fondaĵo Jubilea Jaro jarkomence		7 864
Donacoj		23 523
Elspezoj		– 19 943
Jarfine		11 444
Fondaĵo Kantoj		13 217
Fondaĵo TEJO jarkomence		8 615
Donacoj kaj subvencioj ktp.		1 777
Elspezoj		– 10 392
Jarfine		0
Fondaĵo KER de TEJO		25 838
Subvencioj		3 431
Elspezoj		– 22 038
Jarfine		7 231
Fondaĵo UN/Unesko:		
Donacoj:		336
Subvencio el Propaganda Konto		8 515
Kotizoj NRO kaj elspezoj		– 8 851
Jarfine		0
Fondaĵo Universala Ekspozicio		25 000
Fondaĵo Wüster (Antaŭe: Terminologio):		
Jarkomence		15 282
Donacoj		2 312
Elspezoj		– 157
Jarfine		17 437
Propaganda Konto jarkomence		51 340
Enspezoj (ĉefe de UK)		13 649
Elspezoj kaj subvencioj por diversaj agadoj		– 47 171
Jarfine		17 818
Fondaĵoj entute		**165 225**

Evoluo de rezervoj
de UEA dum 1985

Rezervo Debitora jarkomence		111 700
Deskriboj (ĉefe favoraj saldoj)		8 510
Jarfine		120 210
Rezervo Domrenovigo:		
Donacoj ktp		44 220
Al konto de konstrulaboroj		– 44 220
Kongresa Rezerva Fondaĵo jarkomence		51 840
Enspezoj (69a UK)		2 800
Elspezoj (diversaj)		– 465
Jarfine		54 175
Rezerva Fondaĵo IJK		1 292
Rezervo por emeritaj oficistoj		40 000
Donaco por teleksilo rezervita		3 854
Sumo de la rezervoj		**219 531**

Buĝetpropono
de Universala Esperanto-Asocio
por la jaro 1987

KOSTOJ

Salajroj, malnete	325 000
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	70 000
Volontula Servo	4 000
Senimpostaj suplementoj	11 500
Trinkaĵoj	1 500
Malsankompenso	– 500
Neta kosto de oficistaro	**411 500**
Afranko, nete	22 000
Telefono, telegrafo	14 000
Presaĵoj	7 000
Materialoj	8 000
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj	10 000
Revizoro	1 500
Administraj kostoj ĝenerale	4 000
Fotokopiado	2 500
Centra Oficejo, nete	**69 000**
Gaso, elektro, akvo	13 800
Riparo de la Domo, purigiloj k.s.	7 200
Impostoj je la Domo, asekuro k.s.	6 000
Luoj riceveblaj	– 500
Oficeja Domo, nete	**26 500**
Preskostoj de *Esperanto*	41 000
Sendokostoj (afr. kaj transporto)	55 000
Ekspedlaboro	8 000
Grafiko	16 000
Kovertoj	3 000
Anoncoj	– 12 000
***Esperanto*, nete**	**111 000**
Preskostoj de la Jarlibro	22 000
Sendokostoj	15 000
Kovertoj	1 000
Grafiko	9 000
Ekspedlaboro	1 000
Anoncoj	– 13 000
Jarlibro, nete	**35 000**
Preskostoj de *Kontakto*	9 000
Sendokostoj	9 000
Ekspedlaboro	3 000
Grafiko	9 500
Kovertoj	500
Redakto	3 000
Anoncoj	– 1 000
***Kontakto*, nete (6 numeroj)**	**33 000**
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	30 000
Vojaĝkostoj komisiitoj ktp.	4 000
Vojaĝkostoj oficejaj	4 500
Vojaĝkostoj kongresaj	9 000
Reprezentadokostoj	3 000
Vojaĝ- kaj restadkostoj	**50 500**
Korespondokostoj Estraro ktp.	**8 000**
Bankokostoj	4 000
Belartaj Konkursoj	3 000
Diversaj kostoj	1 000
Ĝeneralaj kostoj	**8 000**
Amortizo de la Domo, ĉ. 1%	4 500
Amortizo de la inventaro: 20%	13 500
Komputilo: 20%	15 000
Programoj: 20%	14 500
Amortizoj, entute	**47 500**
Sumo de la kostoj	**800 000**

RIMEDOJ

Kotizoj MG (Membro kun Gvidlibro)	10 000
Kotizo MJ (Membro kun Jarlibro)	25 000
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	224 500
Kotizoj MJ-K (kun *Kontakto*)	3 500
Kotizoj MA-K (kun *Kontakto*)	11 000
Aligitaj membroj de UEA	25 000
Aligitaj membroj de TEJO	8 000
Simplaj abonoj de *Esperanto*	9 000
Kolektivaj abonoj de *Esperanto*	10 000
Abonoj kaj vendoj de *Kontakto*	9 000
Kolektivaj abonoj de *Kontakto*	5 000
Societo Zamenhof	29 000
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	3 000
Repagoj al TEJO	– 6 000
Kotizoj kaj abonoj, entute	**366 000**
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	**11 500**
Libroservo, favora saldo	150 000
Tantiemoj	– 10 000
Katalogaj kostoj	– 20 000
Libroservo, nete	**120 000**
Abonservo, nete	6 000
Grafikaj servoj de CO	20 000
Diversaj servoj de CO	3 000
Servoj	**29 000**
De Inventaro pro programado	20 000
De Kapitalo Dumvivaj Membroj	30 000
De diversaj pro laboroj en CO	6 000
Pro laboroj Jubilea Jaro	30 000
Kompensoj	**86 000**
Antverpena Oficejo, nete	**10 000**
Kotizoprocentaĵo 72a UK	140 000
Turismo	5 000
Kongresoj kaj turismo	**145 000**
Diversaj enspezoj	**2 500**
Rento, nete	**30 000**
Sumo de la rimedoj	**800 000**

FINO DE LA ESTRARA RAPORTO

La vualo de l' tempo

de J.H. Sullivan (1913)

Dudek originalaj noveloj, en kiuj "rolas la propra stilo de Sullivan, kiu sukcesis esprimi sin per ekvilibre riĉa, klara kaj flua lingvaĵo,... sed la plej trompa trajto estas la fino de ĉiu novelo...: vi neniam trovos..."

Georgo Camacho

Eld. TK/Stafeto, 1985. 116p. 22cm. ISBN 90 6336 028 2. Prezo: 19,50 gld. Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj, plus sendokostoj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Anoncetoj

Familia Feriado okazos ĉe Kultura Centro Esperantista en Svislando de la 14a ĝis la 26a de julio. La aranĝo konsistos el du feriaj semajnoj kun apartaj kaj komunaj aktivadoj por gefiloj kaj gepatroj; kaj el du semajnfinaj seminarioj pri "Esperanto en familio" (19-20 kaj 26 julio). Sendu kontribuaĵon por la seminario kaj petu la informilojn ĉe KCE, Familia Feriado, BP.771, CH-2301 La Chaux-de -Fonds, Svislando.

El Irano korespondas kaj interŝanĝas bildkartojn kaj meti-artaĵojn Esperantista Grupo Ŝahin, Gamshidy, P.O. Box 46, Shahin-shahr, Isfahan, Irano.

Mi translokiĝis: Frans Stein, Leliestraat 20-C, NL-3071 VG Rotterdam, Nederlando.

Beninano 21-jara deziras korespondi kun ĉiuj, kiuj volas helpi en la studo de Esperanto kaj en loka agado. Zinkpè Dovi C. Ben, C.T.L. Guéné Malanville, Benino

16-jara gimnaziano deziras korespondi i.a. pri lingvoj, natursciencoj kaj turismo: Attila Bagó, Népszinház ut 38, H-1081 Budapest, Hungario.

Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ, nova 88-paĝa libro de humuraj monologoj de Stefan MacGill, **ne** por komencantoj. 9,30 gld. ĉe UEA.

La monde ŝatata fabela rakonto, kolore ilustrita kaj bindita, gajninto de la premio:
Infanlibro de la Jaro 1985:

La eta princo

Verkita kaj desegnita de
Antoine de Saint-Exupéry (1900-1944)
Dua, reviziita Esperanta traduko el la franca de Pierre Delaire (1918-1985).

Eld. Kanada Esperanto-Asocio. Montrealo, 1984. 93p. 23cm. ISBN 0 15 246503 0. **Mendu de la Libroservo de KEA**, 6358 de Bordeaux, Montréal, QC. H2G 2R8. Tel. (514) 495-8442. Prezo: $14,00 inkl. de la sendokostoj. Specialaj prezoj por grandaj mendoj. Mendebla ankaŭ de la Libroservo de UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo: 30,00 gld.

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

La nun jama fama legolibro por progresantoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

"Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke la libro estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara senartifika kaj ofte tre originala."

H.A. de Hoog (*Dia regno*, *n-ro* 1/1985)

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

Sciencaj libroj de UEA/SEC

Ĉu vi konas la teron?, Endre Dudich. Budapeŝto, 1983. 150p. (+68p. da fakaj anoncoj). 23cm. ISBN 963 571 080 1. Altnivela, sed populariga enkonduko en ĉiujn branĉojn de la geologio, kun abundaj figuroj kaj tabeloj. Prezo: 12,00 gld.

Geologio internacia, vol.5, red. Endre Dudich. Budapeŝto, 1984. 172p. (+83p. da fakaj anoncoj). 21cm. ISBN 963 571 123 9. Dek sep studoj de diverslandaj fakuloj, kun mapoj, figuroj, grafikaĵoj kaj suplementa faka tabelaro. Prezo: 9,00 gld.

Molekuloj, János Nyilasi. El la hungara trad. Lajos Kovács. Budapeŝto, 1984. 118p. 20cm. ISBN 963 571 145 X. Traktas en populariga maniero fundamentajn problemojn de la kemio, kun aparta atento al kemiaj ligoj en vivaj organismoj kaj aktuala esplorado; abundaj figuroj kaj tabeloj. Prezo: 9,00 gld.

Perkomputila tekstoprilaboro, red. I. Koutny. Budapeŝto, 1985. 336p. 22cm. Ilus. ISBN 963 571 147 6. Dudek unu studoj pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro; kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj kaj resumoj en la angla kaj rusa. Prezo: 30,00 gld.

Radioteknika artikolaro, red. László Szilvási. Budapeŝto, 1984. 64p. (+20p. da fakaj anoncoj). 24cm. ISBN 963 571 166 6. Dudek tri altnivelaj fakaj artikoloj, abunde ilustritaj, kun terminareto kaj bibliografio. Prezo: 7,50 gld.

Sciencaj komunikaĵoj, red. A. Lukács. Budapeŝto, 1985. 96p. Ilus. 24cm. *N-ro 8: Tekniko*. Inercirado, sciencaj nocioj, vakutekniko, metalforteco, ŝutaĵ-transporto, sismiko, metaltranĉado, leviloj, kondukmaterialo. *N-ro 9: Ter-sciencoj*. Paleografio, tertremoj, arkeologio, zoografio, astronomio, minado. *N-ro 10: Komunikado*. Lingva komunikado, perkomputilaj tradukado kaj tekstoprilaboro, edukado kaj la homa cerbo, radiofrekvencaj kabloj, dentrada transmisio. Prezo: po 9,00 gld. por numero.

Rabato de unu triono por aĉeto de minimume tri ekzempleroj al la sama adreso, plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

PIF

PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO

invitas vin al Zagreb, Jugoslavio
23-27 aŭgusto 1986

En Esperanto prezentas profesiaj teatroj el Britio, Francio, FR Germanio, Italio, Pollando kaj Rumanio.

Aliĝkotizo: 20 nederlandaj guldenoj (inkluzivas biletojn por 10 prezentadoj).

Loĝado: En privataj ĉambroj kontraŭ 20 guldenoj nokte.

Informas: Internacia Kultura Servo
Amruševa 5
YU-41000 Zagreb, Jugoslavio;
☎ (041) 424 660

KSM Koresponda Servo Mondskala de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121bis, BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: *INTERNACIA BIBLIO-MISIO*, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

POR INTERNACIA JARO DE LA PACO:

ESPERANTAJ LIBROJ PRI PACO

Temas pri speciale malaltaj prezoj, kiuj validos ĝis la forvendo de nia nuna stoko...

Vilaĝoj en batalkampo 2,70; *En la nubon ŝi sorbiĝis for* 3,30; *Danjo en Vjetnamio* 4,50; *Flustr' el uragano* 7,50; *Hirosima-Nagasaki* (bilda dokumento) 145,00; *Hibakusha* 3,60; *Infanoj de Hirošimo* 5,40; *Akvon mi petas* 6,60; *Nudpieda Gen* 30,00; *Memuaro pri flamoj* 9,90; *Vulpoj de Ĉironnup* 18,90; *Pupo fariĝis cigno* 9,90 guldenoj.

Mendu de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Plus sendokostoj. Rabato de unu sesono por mendo de minimume tri ekzempleroj.

COLLEGE INTERNATIONAL DES MELEZES CRANS S.A.
International high school
(Internacia mezlernejo)

C.P. 51, CH-3963 Crans-sur-Sierre, SVISLANDO

Esperanto-kursoj dum kutimaj studhoroj laŭ deziro

****

Preparo al antaŭ-universitataj ekzamenoj por ekde 15-jaraj gejunuloj en belega montara regiono, sur sunplena sekura alt-ebenaĵo (1 500m / 4 500ft).

****

Ni intencas formi estontajn estrojn, kiuj povos perfekte paroli la francan kaj anglan lingvojn kun laŭvole bonega kono de Esperanto.

La gejunuloj krome lernos perkomputilajn sciencojn kaj uzos modernajn komunikilojn: gazetaron, aŭd-vidajn rimedojn kaj teknikojn ktp.

La semajnfinoj kaj la posttagmezoj estos okupitaj de konferencoj, marŝadoj, sportoj (skiado eĉ somere, naĝado, golfoludo, teniso,...).

La internuleja sumo, entenanta ĉion, estas po 27 000 svisaj frankoj jare.

Pliaj informoj haveblaj skribe de: S-ro A. Piérard, psiko-pedagogo, CIM, CP 51, CH-3963 Crans-sur-Sierre, Svislando.